

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

SCIENCO

Ĉu akvo fluas  
supren?


## Ciganoj

Transvivado de  
vojaĝanta popolo

**EMO raportoj**  
La eŭropa medio-politiko

# Nova sistemo por instrui la internacian lingvon

**ESPERANTO  
PASPORTO AL LA  
TUTA MONDO**



**VIDBENDA KURSO  
POR INSTRUI  
LA INTERNACIAN LINGVON**

**Verkita de d-ro Paul Gubbins**  
Laŭ koncepto de Edwin Grobe

© 1998, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Mendu la PAL-version ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Tel: +32 3 234 34 00

Reto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:

81 EUR + afranko

Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:

81 EUR + afranko

## ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne brem-

sas la disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

**Prof. Duncan Charters**

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj




Estimataj gelegantoj,

**K**iel lingve interesitaj homoj vi certe scias, ke ni (eŭropanoj) vivas en „Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001”, proklamita de Eŭropa Unio (EU). Por la koncerna programo EU kaj landaj registaroj elspezas konsiderindajn sumojn. Oficiala celo estas lingva plurismo. Mi ne scias, kiel estas ĉe vi, sed en Germanio mi havas la impreson, ke pli ĝuste temas pri kampanjo por la fina venko de la angla kiel tutmonda lingvo. Jen lamentas ministroj, ke nur 40 procentoj de germanoj povas konversacii en angla lingvo. Nova federacia kulturĉefo proklamis la germanan „mortinta” kiel lingvo de scienco kaj ekonomio. Ministrino postulas, ke ĉiu lernu minimume du fremdajn lingvojn, kaj ke oni devas instrui la unuan (t. e. la anglan, kompreneble) jam ekde la unua klaso en elementaj lernejoj. La gazetoj distrumpetis tion laŭte, sed prisilentis kutime la postan replikon de prezidanto de instruista sindikato: Niaj infanoj apenaŭ sukcesas lerni la germanan, li diris, do estas iluzio instrui al ili fremdan lingvon. En la memoro de l' homoj certe restos nur la postulo, ke ili devas lerni la anglan por kapabli (en tutmondeco) pluvivi. Bone do, se sola valida lingvo por scienco kaj ekonomio (kaj diplomatio, aviado, turismo ktp. ktp.) estas la angla, ankaŭ en MONATO ni devas respekti tion. Niaj rubrikoj „scienco” kaj „ekonomio” ekde nun uzos nur la anglan, la rubriko „politiko” iom post iom. Nur pri „turismo” ni hezitas, ĉar antaŭ kelka tempo geamikoj niaj revenis el Sud-Ameriko kaj lamentis: Imagu, neniu tie komprenas la anglan lingvon!

Sincere via Stefan Maul

<b>leteroj</b> .....	4
<b>el mia vidpunkto</b> .....	5
- Premoj de l' sekur-rimeno	
<b>politiko</b> .....	6
- RUMANIO: Nepras ŝpari, nepras reformi ▶	
- ESEO: Maksimo ankoraŭ lernenda	
- Reago: Insultoj, misinformoj kaj malveroj	
<b>ekonomio</b> .....	9
- KONGO: La mineja konflikto	
- ĈINIO: Diferenco inter riĉo kaj malriĉo kreskas	
- NAO: Monda grenproduktado malpliigas	
<b>moderna vivo</b> .....	11
- CIGANOJ: Mistraktataj, miskomprenataj (Kovrilo)	
- AŬSTRIO: De-mona decido	
- TOLEREMO: Vira korpo, virina koro	
- NOVNASKITOJ: Sekure nesti	
- HUNGARIO: Buda buduaro apud-budapeŝta	
- PRAHISTORIO: Paŝtisto de la pasinteco ▶	
- LITOVIO: Monumenta laboro	
- INFANOJ: Surstrata skandalo	
- IRLANDO: - Kiel taksi taksiistojn? - Paca invado	
- Notoj: Unuafoja vizito	
<b>serio</b> .....	16
- Historio de la ekonomika pensado / Parto 2: La merkantilismo kaj la fiziokratia defianto	
<b>medio</b> .....	18
- EMO: Medio-indulgo de la ĉefaj ekonomiaj sektoroj ▶	
- IRLANDO: Malpli verda insulo	
- LITOVIO: Kolza oleo anstataŭ benzino	
- Notoj: - Aerhelica boato - Purigo de la haveno de Havano	
<b>scienco</b> .....	21
- TRAMOJ: Publikaltira teknika ekspozicio	
- FESTENO: Molekula arkeologio por frandemuloj	
- Notoj: - Adolekantinoj, karbonataj trinkaĵoj, ostorompigoj - Ĉu akvo fluas supren ie ajn en la mondo?	
<b>lingvo</b> .....	23
- LA JIDA: La influo de la jida lingvo sur Esperanto	
- IRLANDO: Fremda animo, abismo sen limo	
<b>novelo</b> .....	25
- de Higinio García: - El la atesto de Mustafao Vanesavir', submastro - El la esprimado de Vanesa Mustafaoa, vampirino - El la komuniko de Zefiro Lapalpo, motivologo	
<b>libroj</b> .....	29
<b>enigmoj</b> .....	32
<b>informoj de l' MONATO</b> .....	33
<b>ŝerco &amp; satiro</b> .....	34



## Flandra Kongo?

En sia letero (MONATO, 2000/9, p. 4) Wim M.A. de Smet kritikis parton de mia frazo en la artikolo „Lingvo kaj politika povo” (MONATO, 2000/5, p. 13): „La plimulto de la misiistoj tamen venis el Flandrujo, predikis la evangelion kaj instruis en elementaj lernejoj en la flandra.” Li prave tion kritikis. Eble la redaktoro de la rubriko eraris aŭ pripensis min korekti. La originala frazo tekstas: „La plimulto de... instruis en elementaj lernejoj en la franca.”

Zandandu Ntomono ZOLA, Kongo

## Patriotisma gastamo

Se oni antaŭkondiĉas propran bonfarton por havi pozitivan rilaton al aliaj homoj, de kie do venis la irlanda gastamo antaŭ la „Kelta Tigro” (MONATO, 2000/11, p. 7)? Ĝi venis de la konscio, ke la plej bona patriotismo estas gastamo! Angloj, aliaj ol turistoj, ĝis nun ne estas multe ŝatataj tie. Sed perfortemo al fremdulo en Dublino certe ne koncernis tion. Tamen: ĉu ia ajn naciisma ekstremulo surtere estas pli bona ol ia ajn anglo? Kristano amu sian malamikon, kaj des pli sian proksimulon, ĉu katoliko aŭ ne! „Ami” ĉi tie signifas toleri aŭ indulgi. Estas proverbo el Donegal: „Jen tri virtoj de l' filo de la lando: esti reĝo de l' kurado, reĝo de l' saĝo, reĝo de l' naĝado.” Filo de la lando (mac tîre) estas ankaŭ simbola esprimo por lupo, je kiuj Irlando estis plena iam. Pri reĝo de perfortemo kontraŭ fremduloj ne estas la parolo.

Frieder WEIGOLD, Germanio

## Serĉu la ŝercon

Espereble tiuj du intervjuoj kun frite grasaj, plumpe plataj ruĝnazuloj (MONATO, 2000/11, p. 30 kaj 12, p. 30) ne fariĝos kutimo, serio aŭ io simila! Jam tio pri germana kulturo en la novembra numero mirigis nin, t.e. ni vane serĉis ion amuzan en ĝi. Estante denaska germanino kaj novgermano eksdana, ni tamen rezignis pri reago, pensante ke eble iaj dubindaj eksterlandaj elementoj povus ĝui tian „humuron” ... Nu, jen plata ŝerco, konfesinde. Pardonu. Aliflanke tio ja kongruas, ĉu ne, kun la etoso intervua?

Dankon al Brian Moon kaj Barbara Kowalska, kiuj pri sinjoro Frito Graso liberigis nin de l' tasko plendi! Pri la ruĝnaza profesoro-doktoro universala

geniulo fama nun plendas ni, esperante ke tiaj mispaŝoj subnivelaj ne ripetiĝos tro ofte!

Sabine DARBELLAY kaj Henning HAUGE, Germanio

## Torĉo de hipokriteco

Malĝojigis min la agresema titolo „Torĉo de hipokriteco” (MONATO, 2000/12, p. 15). Nia lingvo, kaj sekve ties publikaĵoj, entenas ja la ideon de homa interkompreniĝo kaj paco. Kial do oni permesas, ke tiaj malamike malamigaj superskriboj kaj artikoloj aperu? Kiel la aŭtoro scias, ke vere temas pri hipokriteco, kiam aŭstralianoj komisiis elstaran aboriginon porti la olimpian torĉon? En preskaŭ ĉiuj popoloj de la tero, ankaŭ en tiu de la aŭtoro, troveblas kruelemaj friponoj kaj samtempe sanmensaj homoj. Ĉu iu ajn rajtas malŝarĝi, eĉ en nobla homfratiga lingvo, malicon kontraŭ bonintencaj bonvoluloj kaj ties simbolaj agoj?

Werner SCHAD, Argentino

## Alfabetigi la japanan

Ekzistas ĉefe du manieroj alfabetigi la japanajn proprajn nomojn: la kabineta kaj la hepburna (angleca). En la artikolo „Erupcias maltrankvilo” (MONATO, 2000/12, p. 16) la aŭtoro literumas la longajn vokalojn: „Hokkaidou, Touya, Oosima”. Tamen, laŭ la kabineta sistemo devas esti: „Hokkaidoo, Hokkaidô, Tooya, Tôya, Oosima, Ôsima”; kaj, laŭ la hepburna sistemo: „Hokkaido, Hokkaidoh, Toya, Tohya, Oshima, Ohoshima” ktp. Fakte ankoraŭ neoficialaj estas „Hokkaidou, Touya”, kaj ĉi tiuj estas nepre evitendaj en gazetoj, kvankam tiaj pli kaj pli oftas pro influo de komputado.

Ĉeŝiĝu ŜAŬMAĴO, Japanio

## Ekzakta nombro

En la artikolo „La influo de la hebrea lingvo sur Esperanto” de André Cherpillod (MONATO, 2000/12, p. 18) staras, ke la *Pentateŭko* „entenas ekzakte 79 856 literojn”. En la libro *The Bible Code* Michael Drosnin diras, ke estas 304 805 literoj. Ĉu eble André Cherpillod citis la nombron de vortoj?

Oskaro SHER, Sud-Afriko

## Ekskuzoj

La novelon de Sten Johansson kun la titolo „Kun ekskuzo sen ekskuzo” (MONATO, 2000/12, p. 23), kies titolo


ŝajnis paradoksa, mi legis kun scivol-emo. En la rakonto la aŭtoro provas perdi la leganton en geneologia labirinto. Sed kiam oni alvenas ĝis la fino, oni komprenas ke oni devas legi la titolon „Kun eks-kuzo sen ekskuzo”, kaj oni ĝuas la surprizon. Tamen, eĉ la aŭtoro perdiĝas en la propra labirinto. Kamilo ne estas la bovicduonekskuzo de Eddie, sed nur lia eks(vicduon)kuzo. La prefikso bo- kontraŭdiras la prefikson vic-, kaj la ordo de la prefiksoj ne estas indiferenta. Tamen, la afero estas tiel malsimpla ke la aŭtoro meritas ekskuzon!

Jean-Claude CARACO, Francio

## Malbona venko

Bedaŭrinde mi devas pravigi Stefan Maul pri lia tezo: „Malbono ĉiam venkas bonon” (MONATO, 2000/12, p. 30). Jen kelkaj pruvoj el Nederlando: 1. En kelkaj lokoj oni ne plu prezentis filmon pri la fama piedpilka teamo Ajax pro la minacoj de huliganoj de la rivala klubo Feyenoord detruo la kin-ejon. 2. Du membroj de la motorcikla klubo *Hells Angels* perforte eniris televidan studion, post kiam en programo oni nomis ilian klubon krima organizaĵo. Sub minaco ili devigis la prezentantojn fari pardonpeton antaŭ la mikrofono. Krome ili malbontraktis la prezentantojn, kiuj ĝis nun ne kuraĝis denunci la perfortantojn pro timo de reprezalioj.

Rejna DE JONG, Nederlando



Malbono ĉiam venkas.

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (=zamenhofa!). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

guido@fel.esperanto.be

# Premoj de l' sekur-rimeno

La homoj ne vivas sen principoj. Post la principo de ago-reago, la principo de ekvilibro, la principo de Arkimedo, kaj multaj aliaj, ni nuntempe vivas sub la principo de antaŭzorga saĝo, de providenco. Ni ne plu volas alfronti kaj akcepti riskojn.

## Kolektiva psikozo

Claude Allégre [klod alegr], eksministro pri kulturo de Francio, en „L' Express” de 16/11/2000 asertas: „Neniu principo pri antaŭzorgo povas pravigi la ne-reagon, des malpli la manipuladon de miloj kaj miloj da civitanoj per kolektiva psikozo”. Kaj li klarigas kiel socio, kiu celas nur sin protekti kontraŭ riskoj, estas socio survoje al ruiniĝo. La dinamismo, la elvolviĝo, la vivo per si mem estas risko. La ŝtata providenco neniam povos esti aseku-ro kontraŭ morto, sekve ĉiuj leĝoj, ankaŭ tiuj kiuj celas protekti la individuon kontraŭ riskoj, en la realo transformiĝas en limigon de la libereco de tiu individuo.

La deviga, laŭleĝa uzo de sekur-rimeno en aŭtomobilo apartenas al tiu kolektiva psikozo. Ĝi estas tipa ekzemplo de atenco kontraŭ la minimuma individua libero, pravigita de supraĵaj ekspertizoj.

## Risko por gajni aŭ ne perdi

La homoj ne komprenas la diferencon inter la risiko por gajni kaj la risiko por ne perdi. La homo kiu riskas ekskluzive por gajni, en realo nur ludas sub mistika impulso de avido. La homo kiu riskas por ne perdi, ne pensas pri gajno sed pri racia akcepto de la riskoj kiuj koncernas la vivon.

La ekspertizistoj, la leĝofarantoj nur konsideras la analizojn en la risiko por gajni, kaj ignoras la plej primarajn statistikajn regulojn. Por raciaj homoj, probable de unu en miliono (1/1 000 000) estas kvazaŭ nul, sed la mistikuloj fronte al tiu proporcio ankoraŭ ludas ... ĉar unu devas gajni, ne interesas ĉu miliono perdas! Vere strange. Tiu rezono entute apartenas al la apliko de la sekur-rimeno el la kolektiva psikozo. Kaj la grandega plimulto ŝafe obeas la leĝojn, ankaŭ pro alia psikozo, kiu estas la timo pri monpuno! Unu fojon plian tiu tutmonda enorma plimulto ne demonstras pravon sed tutsimple, ke la homoj estas pli aŭ malpli similaj, ankaŭ en stulteco.

## Teknika rolo

Laŭ teknika vidpunkto la rimeno funkcias ĉar ĝi kroĉas nian korpon al la maso de la maŝino, tiel nia

propra maso intime apartenas al tiu de la aŭto. Dum veturado nia kineta energio ne plu estas sendependa sed estas ligita al la tuto. Se ĉasio kaj karoserio rezistas okaze de kolizio aŭ renversiĝo, la sekurrimeno savas nin, jes. Tamen laŭ la statistikoj tio okazas nur en 50 % de la akcidentoj. Sed en okazo de incendio aŭ falo en akvon, la spertaj ekspertizistoj konfesas, ke la zono malhelpas rapidan eliron je granda elcento, do ĝi povas mortigi.

Teknike, laŭ ergonomia konsidero la rimeno estas katastrofo. La senĉesa premo estas ĝena, malhelpa por stirado. Kiu estas malalt-kreska ĝuas konstantan „komforton” kvazaŭ segadon ĉe la kolo. La kompatindaj virinoj ne scias kiel zorgi pri siaj mamoj. Ĉu tiu suferado valoras la penon?

## 1 600 000 km

Tio estas la sperto pri veturado, stirado de la aŭtoro de ĉi tiu ne nur vidpunkto sed ankaŭ vivpunkto. Veturadoj en ĉiuj kontinentoj po 40 000 km jare dum 40 jaroj, ekvivalentaj al 40 teraj ĉirkaŭiroj. En averaĝa rapido de 80 km/h tio

signifas kroĉiĝon al la stirilo dum 20 000 horoj aŭ diurne 833 tagoj, t.e. du sinsekvaj jaroj kaj kvar monatoj.

Kompreneble, feliĉe sen sekur-rimena premo, sen laŭleĝa, suferiga premo kaj same feliĉe sen akcidento, la risiko de ne-perdo venkis. La kelkaj monpunoj estis sensignifaj, ĉar en Brazilo la policistoj estas kompleze komprenemaj, des pli kun trink-dankmono

post rido, kiam ili legas la 10 motivojn kial mi ne uzas la rimennon, kaj ĉar mi ne estas kolbaso, kiun oni ligas je la ekstremoj ...


Por francoj la afero estas iom pli malsimpla ĉar „leĝo estas leĝo” nur. En Usono la ŝerifoj ne komprenas mian anglan lingvon, do 20 dolaroj da monpuno estas normala afero kun invito iri post dek tagoj al tribunalo. Ili forgesas kalkuli kiom da kilometroj la aŭto forveturos dum dek tagoj.

Estas bone konscii, ke la uzo aŭ ne-uzo de sekurrimeno ne havas influon sur aliuloj, ke la rimeno mem ne evitigas kaj ne okazigas akcidentojn (aŭ eventuale nur pro la ĝeno al la ŝoforo). Sekve ĝi estas nur atenco kontraŭ la individua libero pro ridindaj leĝoj, pro kolektiva psikozo.

Jam antaŭ pli ol 200 jaroj la filozofa Condorcet [kondorse] timis pri tio ke „ni riskas eniri en regnon de ekspertizistoj kaj en diktaturon de nescio, de obskurantismo: la scienca klopodo estas pli ol simpla saĝo kaj prudento, sed la ĝusta rezonado tie aplikiĝas tro malofte”.

La filozofa pravis.

Gilbert LEDON



## RUMANIO

# Nepras ŝpari, nepras reformi

Fine de 2000 la rumana parlamento elektis kiel ĉefministron Adrian Nastase, vicprezidanton de la socialdemokratia partio PDSR.

Tamen la partio, gvidata de prezidanto Ion Iliescu, disponas en la parlamento pri nur malplimulto de deputitoj. Apogas ĝin la Naciliberala kaj Demokratia Partioj kaj la Asocio de Hungaroj. Tiuj tri partioj kontrakte konsentis dum unu jaro subteni la novan ĉefministron. Kontraŭis lin la dua granda parlamenta partio, la ekstremdekstra Granda Rumanio (PRM).

Nastase promesis akceli ekonomian kreskon kaj eniron en la Eŭropan Union (EU) kaj la Nord-Atlantikan Traktat-Organizaĵon (NATO). Li diris, ke la estonto de Rumanio estas ligita kun Eŭropo, kaj aldonis, ke NATO estas la sola prudenta kaj ebla garantianto de ŝtata sekureco. Tamen antaŭ nelonge la Eŭropa Komisiono komunikis, ke Rumanio ne povas esti konsiderata „funkcianta merkata ekonomio” kaj ke nepras ŝparoj kaj ekonomiaj reformoj.

## Privatigo

Laŭ Nastase, la registaro celas ĉiujaran ekonomian kreskon de ĝis 6 %, ĉefe per eksteraj investoj, pliiĝo de malgrandaj kaj mezaj entreprenoj kaj per privatigo. Tiel li esperas fine de sia mandato en 2004 malpliigi jaran



**Ĉefministro Adrian Nastase:** bonega juristo kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj (1990 - 1992).

inflacion ĝis sub 10 % (nuna inflacio: preskaŭ 40 %).

Nastase estis ekstera ministro de Rumanio en la periodo 1990-1992 kaj estas konsiderata adoranto kaj favorato de prezidanto Iliescu. Tiu regajnis potencon kaj prezidantecon post kvar jaroj en politika forgeso. Lia venko en la prezidantaj balotoj en novembro signifis duoblan venkon, ĉar samtempe triumfis lia partio PDSR, jam forpuŝita en balotoj en 1996. La tiam

estiĝinta koalicio de centristaj partioj ne plenumis siajn ekonomiajn reformojn kaj tial fiaskis en la ĵusaj balotoj.

Malsimile al la plimulto de eksaj komunismaj landoj en meza kaj orienta Eŭropo, Rumanio faris etan progreson en la pasinta jardeko rilate privatigon de la ekonomio kaj allogon de fremdlandaj investoj. La registaro de Victor Ciorbea en 1996-97 liberigis i.a. prezojn kaj valuton, kio ege necesis. Tamen la reformoj neniel fleksebligis la ekonomion aŭ rompis ŝtatmonopolojn. Anstataŭe, la enlanda malneta produkto malpliigis je 7 % kaj inflacio akceliĝis. Nur post tri jaroj oni notis ekonomian kreskon: 1,5 % en la jaro 2000. Oni prognozas en 2001 kreskon de 3 %, kiu dependas tamen de restrukturigo de metalurgio en Rumanio.

## Malriĉo

Laŭ statistikoj, ĉiu tria rumano vivas en malriĉo kaj devas kontentiĝi je monata enspezo el ekvivalento de malpli ol 30 usonaj dolaroj. Inter aŭgusto 1999 kaj aŭgusto 2000 plialtiĝis prezoj je 45,4 %: aparte draste kreskis prezoj de legomoj kaj viandoj. Pro tio oni atendis inflacion de preskaŭ 40 % por la jaro 2000, al kio kontribuis la alta kosto de kruda petrolo, perdoj en agrikulturo pro senpluveco kaj la malalta kurzo de la eŭro.

Inter akraj kaj nesolvitaj problemoj restas la ankoraŭ funkciantaj malgajnigaj ŝtat-entreprenoj kaj la manko de profitodona privata sektoro. Sen tieaj solvoj oni ne povas esperi je sukceso survoje al merkata ekonomio kaj eniro de Rumanio en la Eŭropan Union.

Evgeni GEORGIEV



**La 70-jara Ion Iliescu:** iama komunisma funkciulo kaj eksa prezidanto (1990 - 1996).



**Corneliu Vadim Tudor:** ĉefo de la ekstremdestrula partio Granda Rumanio.



La murdo de Alberto Adriano estis signalo por diskuti ekstremismon.

**ESEO**

## Maksimo ankoraŭ lernenda

Jomo Ipfelkofer konsideras reagojn al leganto-letero lia, aperinta en germana ĵurnalo.

**P**asintjaraj bombatenco kontraŭ orientaj judoj kaj murdo de malhelhaŭta mozambika patro kaj edzo estis en Germanio kvazaŭ signaloj por diskuti dekstran ekstremismon - tre malfrue laŭ tiuj, kiuj jam de jardekoj atente observas agadojn de brunaj bandoj kaj naziaj propagandistoj.

Post la kunfandiĝo de la du germanaj ŝtatoj subite montriĝis publike - precipe en orienta Germanio - junuloj, ofte kalve razitaj, en jakoj similaj al tiuj de bombaviadistoj kaj en botoj de paraŝutistoj. Pruviĝis la franca proverbo „*les extrêmes se touchent*” (la ekstremoj tuŝiĝas). Samtempe amaskomunikiloj en iama okcidenta Germanio raportis pri atakoj kontraŭ fremduloj, precipe turkoj kaj azilpetantoj. Mortis homoj en bruligitaj domoj. La kanceliero ne partoprenis la entombigojn, dirante, ke li ne volas praktiki „funebran turismon”.

### Akre punitaj

La novaj atakoj en 2000 kaptis la atenton de publiko kaj de politikistoj. Tri junuloj, kiuj mortbatis nigrulon, estis neordinare rapide kaj akre punitaj. La juĝisto komentis: „Bestoj montras kompaton al viktimoj kuŝantaj surtere - vi ne”. Ekde tiu tempo la gazetoj estis plenaj de reagaj legantoleteroj. Sed foje tiuj, kiuj skribis - inkluzive min - ricevis bizarajn, ofte anonimajn leterojn kaj telefonvokojn, kiuj venis ne de ekstremdekstruloj, sed de aliaj flankoj.

Ekzemple, mastro de malgranda entrepreno plendis, ke la ŝtato, kiu pretendas defendi homajn rajtojn, „torturis” ĝismorte lian edzinon. Pro miskalkulo aŭ alia eraro la loka financoficejo postulis tro da impostoj: pro ĉagreno kaj zorgoj la edzino sin mortigis. Alia skribis pri „germana neŭrozo”, kulpigis gazeton kaj televid-programojn, kaj rekomendis

vojaĝi al Turkio aŭ Israelo por renkonti veran rasismen. Membro de tiel nomata „kristana mezo” skribis, ke germanaj kristaninoj batalas pro sia kredo same kiel islamanoj pro sia, kaj asertis, ke judoj en Palestino intencas ekstermi germanojn: „La germanoj pro 50 jaroj da malĝustaj/falsaj kulpasentoj iĝis psike malsanaj kaj mense idiotaj same kiel vi” (efektive ne eblas ĝuste traduki ĉiujn esprimojn pro amaso da ortografiaj kaj gramatikaj eraroj).

### Normalaj civitanoj


La homoj tiel misargumentante supozeble ne apartenas al la botoportantaj kaj kalvaj teroristoj. Ili estas kvazaŭ normalaj civitanoj - ne tre kleraj kaj saĝaj, sed kiuj dum sia vivo spertis ion ĉagrenan, malbonan, eble abomenindan, kaj ofte laŭleĝan flanke de ŝtataj instancoj. Tial ili bezonas viktimojn kontraŭbataleblajn, homojn malpli fortajn kaj ĉerande de la socio: fremdulojn, eksterlandanojn, handikapulojn.

Ili nur mallaŭte kaj kaŝe agas; ili ne estas krimuloj, malobeantaj leĝojn, kaj ne estas distingeblaj en la amaso. Sed povus esti, ke ili denove subtenus reĝimon maldemokratian, malhomecan, diktaturan - esperante de ĝi subjektivan avantaĝon kaj rapidan solvon de sociaj kaj internaciaj problemoj, ne konsiderante la „kromefikojn” de totalisma, nedemokrata, rasisma politiko.

### Kion ili lernis?

Necesas la demando: Kion lernis tiuj homoj el lecionoj pri historio? Ĉu ili mislernis, ĉar kronikistoj raportis pri „grandaj viroj”, kiuj vere ne malofte estis amasmurdistoj? Ĉu Aleksandro, Karlo, Frederiko la „Grandaj” meritas esti traktataj kiel granduloj admirindaj? Ĉu homaj rajtoj, toleremo kaj kosmopoliteca akceptemo estas nura makulato, se dum la lernejoj jaroj oni lernas tiom malmulte pri aliaj kulturoj?

Kiel diris parlamentano Michel Friedmann [miŝel fridman], vicprezidanto de la asocio de judoj en Germanio: „Neniu religio, neniu kulturo estas pli bona ol alia religio aŭ alia kulturo”. Ŝajnas, ke ĉe kelkaj homoj tiu ĉi maksimo ankoraŭ lernendas. ■



Friedman (dekstre): „Neniu kulturo estas pli bona ol alia.”



# Insultoj, misinformoj kaj malveroj

**Al la eseo de Bardhyl Selimi pri Kosovo aperinta en la januara numero de MONATO – „Vojaĝimpresoj, somero 2000” – reagis per letero K. Eckstädt. Jen – en iom koncizigita formo – la komentoj de la aŭtoro:**

La eseo insultas la serban popolon kaj plenas je misinformoj. Ĝi komenciĝas per frazo en la stilo de stalinisma ĵurnalismo: „De antaŭ unu jaro Kosovo estas servize malfermita por ĉiuj albanoj. Tion ebligis la heroeca milito de la tieaj albanoj mem.” Eble s-ro Selimi povas diri, kiam jugoslavo povis eniri servize Albanion. Ĝuste estas, ke albanoj ne povis eniri Jugoslavion, kaj ke jugoslavo ne povis eniri Albanion.

Rilate la fotojn: videblas la detruita Hadumo-moskeo en Djakovica, kiun la aŭtoro erare nomas Gjakova. Ĉiu, kiu ne konas la situacion en Kosovo, devas pensi, ke serboj estas barbaroj, kiuj moskeojn detruis, kaj ke albanoj estas toleremaj. La aŭtoro ne diras, ke en Kosovo albanoj detruis pli ol cent ortodoksajn preĝejojn kaj timigis monaĥinojn, tiel ke tiuj ne kuraĝis surkampe labori.

La unua urbo, kiun priskribas la aŭtoro, estas Prizren. Li skribas: „La urbo enhavas, krom la albana plimulto, ankaŭ civitanojn de aliaj etnoj, sed la serboj preferas vivi aparte.” Fakte, kvankam laŭ s-ro Selimi albanoj estas toleremaj, ili preferas esti protektataj 24 horojn diurne kaj ili preferas gardi sian preĝejon – la Madona-preĝejo „Bogorodica Ljeviška”, konstruita en 1306-07 kaj grava monumento de bizanca arkitektura stilo. Ĉu mirigas, ke serboj deziras gardi ĝin?

## Vera absurdaĵo

Survoje al Priština la aŭtoro vidas rubon flanke de la strato. Laŭ busŝoforo: „Oni faras tion intence ĉar rusoj militservas ĉi tie. Vera absurdaĵo! Tio estas nia tero, la tero de albanoj, do ĝi estas konservenda de ni mem tre pura!” Ĉu tiu ĉi tero estas nur tero de albanoj? Kie estas la tero de serboj? Ilia tero estas forprenita antaŭ multaj jaroj. Se serboj rifuzis vendi (t.e. fordoni) sian teron al albanoj, ili devis fuĝi. Poste en okcidenteŭropaj amaskomunikiloj oni raportis, ke en Kosovo loĝas ĝis 90% albanoj.” Neniu demandis, kial forestas serboj kaj montenegranoj.

S-ro Selimi notas, ke „Kosovo estas je la nodo, kie interplektiĝas ... intereso” (i.a. de Jugoslavio, Francio, Grekio, Italio, de 15 landoj de NATO, ktp). Sed kiaj intereso? Estus interese scii. Ĉu NATO ricevis tiamaniere regionon, de kie ekbombi aliajn landojn? Kaj la aŭtoro ne mencias la interesojn de Albanio, kiu avidas la ercojn de Kosovo.

S-ro Demaçi, menciita en la eseo, estas saĝa kapo. Li ne deziras la universitaton en Tetovo, ĉar „tiuokaze oni devas sekvi la programojn makedonajn.” La jugoslava registaro grave eraris en la 60aj jaroj. Ĝi malfermis universitaton en Priština, kie oni povis studi ankaŭ albanlingve. Presi librojn por malmulte da studentoj multekostis

kaj la registaro permesis venigi librojn el Albanio. Tiel oni importis propagandon kontraŭ Jugoslavio.

## Tri fingroj

Kiel oni propagandas, bone montras la aŭtoro. Li uzas eĉ naturbelajojn por misfamigi serbojn. „Ie ni vidis kristalon je formo de du fingregoj, al kiu serboj detranĉis unu el la fingregoj. Certe, se estus tri fingroj (serba simbolo) ... ili restus nedamaĝitaj. Tiel serboj agis ankaŭ kun alia kristalo, je formo de la agloflugilo.” Facile direblas, ke tion faris serboj. Sed la aŭtoro eble ne scias, ke dukapa blanka aglo estis simbolo de multaj serbaj reĝoj kaj ankaŭ de caro Duŝan. Do kial tiel agus serboj?

Pri la preĝejo de Sultano Murat la Unua: ĝi ne estas preĝejo sed maŭzoleo. Ĝi estas konstruita tuj post la batalo de Kosovo-Kampo, pri kiu la aŭtoro albane fabelas. Ĉe li Miloš Obilic estas albano el albana vilaĝo Kopiliq. La vilaĝo estis Kobilic: *kobila* estas serba esprimo por ĉevalino. Krome, Miloš estis neniam albana nomo (aŭ ĉu la aŭtoro kredas, ke ankaŭ Slobodan Milošević estas albano?). Miloš Obilic estis serba nobelo, egale ĉu tio plaĉas al albanoj aŭ ne.

S-ro Selimi skribas, ke necesas korekti serbalingvajn surskribojn sur la monumento al la batalo de Kosovo-Kampo por montri la veron. La aŭtoro mem devas lerni skribi la veron. Tion farinte, li ne skribos pri serboj nur kiel krimuloj kaj pri albanoj nur toleremaj kaj laboremaj. Albanoj estas tre laboremaj, sed ĉu toleremaj?

S-ro Selimi skribas pri grandaj monsumoj. Li parolas pri poŝt oficisto, kiu devis pagi 50 000 germanajn markojn por sia vivo. De kie havis simpla poŝt oficisto tiom da mono? Germana poŝt oficisto certe ne havus tiom. Mi ne volas diri, ke tio ne estas vero: sed ankaŭ s-ro Selimi ne scias, ĉu tio estas vero. Li skribas, kion oni rakontis al li – kaj al li tio sufiĉas.

## Terorista organizaĵo

Mi jam parolis pri serba propagando – sed ĉu albanoj neniam propagandas? La aŭtoro mem respondas al ĉi demando. Li skribas pri fianĉo, kiu vagis de unu domo al la alia, helpante malfortulojn kaj membrojn de la UĈK. Kiam serboj mortpafis membron de ĉi terorista organizaĵo, albanoj diris, ke la mortigito estas civilulo. Tio estis ankaŭ propagando – ilia propagando.

Mi intence skribis „terorista organizaĵo”. Al mi ne estas klare, kial okcidenteŭropaj amaskomunikiloj nomas UĈK-on armeo, sed IRA-on (en Irlando) kaj ETA-on (en Hispanio/Eŭskio) teroristaj organizaĵoj. Sen IRA ne ekzistus hodiaŭa Irlando. Aŭ ĉu ili estas teroristoj, ĉar ili batalas por sendependeco en landoj apartenantaj al EU?

Se raportistoj deziras esti objektivaj, ili devas respekti aliajn opiniojn. Jam sufiĉas la multaj artikoloj en MONATO kontraŭ serboj. Ofte, ilin legante, mi koleris. Koncerne la artikolon de s-ro Selimi, mi tamen preskaŭ ridis pro la multaj malveroj. Verdire la reputacio de MONATO devigas pli bone legi ricevitaĵajn manuskriptojn. K. ECKSTÄDT




KONGO

# La mineja konflikto

## Naciigo kaj denove privatigo

En 1966 la tiama prezidento Mobutu deklaris: „Ni ne povas akcepti ke privatuloj, precipe fremdaj, konservas 80 % de la ekonomia potenco en la lando.” La nuna Gécamines [jekamín], aktiva en Katango-provinco, estas rezulto de la naciigo de eksterlandaj entreprenoj okazinta en 1967. Dum iu periodo Gécamines kontribuis je 60 % al la konga buĝeto, kaj du trionoj de la elfositaj kupro kaj kobalto estis aĉetitaj kaj prilaboritaj de belgaj entreprenoj. Pro konfliktoj inter Kongo kaj Belgio la ekspluatado stagnis kaj en 1994 la restantaj profitdonaj partoj estis denove privatigitaj. Kvankam Kabila, dum la milito per kiu li akiris la povon, interkonsentis kun Usono, ke usonanoj mastrumos Gécamines, ĝi nun estas regata de konganoj kaj zimbabvanoj. Ĝia situacio ankoraŭ estas malbona kaj ankaŭ belgaj entreprenoj ne sukcesas fari kontraktojn kun la konga registaro.





*Gécamines estas rezulto de la naciigo de eksterlandaj entreprenoj.*

## Diamantoj financas militon

MIBA (Minejo de Bakuanga) ekspluatas diamantojn oriente de Kasai-pro-

vinco. Plejparto de tiuj – same kiel la diamantoj trovitaj de privatuloj – estis kontrabande eksportitaj al kaj komercitaj en Sud-Afriko kaj Belgio kaj nenion alportis al la konga ŝtata buĝeto. En 1999 la registaro de prezidento Kabila decidis mem ekspluati la MIBA-diamantojn kaj malpermesis aĉeti diamantojn rekte de la minejoj. La ŝtato kreis monopolan aĉetoficejon en la ĉefurbo Kinŝaso. Laŭ



*Kabila volis aĉeti armilojn pagante per diamantoj.*

## Historia fono

La Sendependa Ŝtato de Kongo origine (fine de la 19a jarcento) estis privata posedaĵo de la belga reĝo Leopoldo 2a, kiu jam ekde sia junaĝo estis konvinkita ke Belgio nepre bezonas kolonion. En la komenco de la 20a jarcento la reĝo donacis (aŭ altrudis, dependas de la vidpunkto) sian posedaĵon al la belga ŝtato. Tiel Kongo iĝis belga kolonio ĝis la sendependiĝo en 1960.



*Leopoldo 2a.*

La nunaj minejaj entreprenoj en Kongo estas postsekvantoj de kompanioj kiuj dum la kolonia periodo akiris koncesiojn por ekspluati iun regionon. Tiuj kompanioj estis, ankaŭ post la sendependiĝo, plejofte mastrumataj ekde la belga ĉefurbo Bruselo. RR

Kabila, tiu decido ebligis al la lando aĉeti armilojn. Tio malsukcesis, kaj en la lando daŭre mankas valuto.

Ruandaj kaj ugandaj militistoj, kiuj batalas kontraŭ la registaro de Kabila, okupas la orientan parton de la lando kaj laŭplaĉe ekspluatas la oron kaj la diamanto-minejojn de la regiono. Dufoje ili batalis ĉirkaŭ Kisangani, la ĉefurbo de la orienta provinco, por akiri la kontrolon de la diamanto-komercio.

UN-rezolucio 1173 de la 1a de julio 1998 klopodis krei embargon sur la minejajn produktojn de ribelaj armeoj. Sekve al tio, la konga registaro decidis doni la eksport-monopolon de diamantoj al israela entrepreno. Tiu decido malkontentigis la privatajn negocistojn kaj denove ne alportis valuton.

Negocisto kiu aĉetis diamanton de 250 karatoj, kostantan preskaŭ 30 milionojn da usonaj dolaroj, estis arestita. Laŭ la konga polico, tiu diamanto devenas de la MIBA-koncesio. La negocisto estis liberigita post multaj semajnoj, sen sia diamanto.

Zandandu Ntomono ZOLA

# Diferenco inter riĉo kaj malriĉo kreskas

Nun en ĉinaj bankoj la totalaj mondeponoj de urbanoj jam atingas 6000 miliardojn da juanoj. Post enketo oni konstatis, ke inter la urbanoj la riĉuloj estas malpli ol 5 %, tamen iliaj deponoj jam konsistigas ĉirkaŭ duonon de la totala deponsumo. La fenomeno, ke en la ĉinaj urboj malmultaj riĉas kaj multaj malriĉas, montriĝas tre grava.

Tamen, ekde 1999 aperis ankaŭ alia fenomeno: la diferenco de enspezo inter la urbanoj kaj la vilaĝanoj draste pligrandiĝis. Freŝa ekonomia bulteno de la Ŝtata Statistika Buroo, rilata al enspezoj de 4000 familioj en urboj kaj vilaĝoj, anoncas ke en 1999 la disponebla enspezo estis po 5854 juanoj por urbano. Kompare kun la antaŭa jaro ĝi kreskis je 7,9 %. Sed en la sama jaro por plejparto de la kamparaj familioj la enspezo apenaŭ plimultiĝis. Dum la periodo 1997–1999 la plenaĝaj vilaĝanoj en orienta Ĉinio, kie estis bona ekonomia situacio, meznombre havis enspezon de pli ol 3000 juanoj jare. Samtempe, en la malriĉa okcidenta Ĉinio la enspezo ne superis 1000 juanojn.

Pli grave estas ke, dum la urbana enspezo kreskas stabile, la diferenco inter enspezoj de la urboj kaj la vilaĝoj pligrandiĝas daŭre. La bulteno asertas ankaŭ ke 20 % de la ĉinoj, kiuj posedas 43 % de la sociaj riĉaĵoj, havas altan enspezon.

La granda diferenco inter riĉo kaj malriĉo estas kaŭzanta plurajn sociajn problemojn. Tion la ĉina registaro taksas grava kaj ĝi alprenas kelkajn metodojn por ne lasi la diferencon plu pligrandiĝi. Ekzemple, ĝi subtenas kaj kuraĝigas fortajn entreprenojn en- kaj eksterlandajn, por ke ili ekspluatu la okcidentan parton de Ĉinio. Per tio eblas redukti la ekonomian diferencon inter partoj orienta kaj okcidenta.


Krome, la registaro laŭeble f-

ras politikon, kiu helpas al malriĉuloj eliri el embaraso. Fakuloj pri socio kaj pri ekonomio serioze tion kritikis, opiniante ke tiuj klasikaj metodoj havos bonan efikon nur post relative longa tempo kaj tute ne povas solvi urĝajn aferojn, kaj ke por la nuna Ĉinio, en kiu vivas kelkcent milionoj da malriĉaj kamparanoj, oni nepre devas serĉi apartajn rimedojn por ke ili komencu suriri riĉigan vojon.

MU Binghua



5% de la ĉinoj estas relative riĉaj. La aliaj restis en mizero.



En 38 landoj nun mankas greno.

## NAO

# Monda grenproduktado malpliigās

Lastatempe la Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo de UN publikigis raporton, kiu prognozas ke dum la jaroj 2000 kaj 2001 la totala monda produktokvanto de greno atingos nur 1 848 miliardojn da tunoj, 1,7 % malpli ol en 1999. Jam en aŭgusto de 2000 la organizaĵo faris prognozon, sed ĉar kelkajn gravajn landojn trafis longtempa sekeco, ĝi malpliigis la antaŭan ciferon.

Kompare kun la antaŭa jaro, en 2000 la produktokvanto de tritiko malkreskis je 1,4 % ĝis 582 milionoj da tunoj. Ankaŭ la kvanto de malpli gravaj grenoj, kiel aveno, hordeo, maizo kaj sorgo, malkreskis je 1,5 % ĝis 870 milionoj da tunoj. Rizo malpliigis je 2,3 % ĝis 397 milionoj da tunoj.

La raporto aparte montras ke, dum la produktado de greno falas, landoj kaj regionoj kiuj urĝe bezonas gren-helpon plimultiĝas. Laŭ antaŭkalkulo, la helpiveroj kreskos de 52 ĝis 62 milionoj da tunoj inter 1999 kaj 2000.


En la mondo nun estas 38 landoj kie mankas greno. Ili plejparte situas en orienta Afriko, kie ofte okazas serioza sekeco, en sudorienta Azio, minacata de inundoj, kaj en iuj regionoj de centra Ameriko, kiuj ofte renkontas ŝtormventon. En Eŭropo, partoj de Jugoslavio kaj Rusio malsamgrade suferas pro manko de greno.

MU Binghua

## CIGANOJ

# Mistraktataj, miskomprenataj

Ciganoj ne konsistigas homogenan popolon. Por ili ekzistas multaj lokaj nomoj: roma, manuŝe, kalè, sinti k.a.. Ili loĝas en multaj landoj (sen propra teritorio), sed malgraŭ diversa religia aparteneco ili tenas samajn familiajn valorojn. Ilia lingvo, la cigana, havas komunan bazon, sed ĝi ekzistas en la formo de multnombraj regionaj dialektoj.



**L**a rilato de la loksidaj ciganoj (nur 5 % estas nomadoj) al la ceteraj lokaj loĝantoj karakteriziĝas per percepto de la diferencoj. Kun siaj profesioj kaj vivmanieroj la ciganoj konsistigas ekonomian kaj kulturen minoritaton en la socio de la koncerna lando. Ilia forta etna identeco krizas, se pro malriĉeco kaj politikaj obstakloj ili ne plu povas okazigi siajn festojn kaj montri sian etnan identecon.

Malgraŭ vasta ĉeesto en la loka loĝantaro en iuj landoj la ciganoj tamen havas tre limigitan potencon en landaj kaj internaciaj forumoj. Ekzemple, en Ĉeĥa Respubliko, kie ciganoj konsistigas grandan minoritaton, en la 200-

membra parlamento ili disponas pri unusola reprezentanto. La sama situacio troviĝas en Bulgario, kie la ciganoj estas la dua plej granda minoritato, sed estas reprezentataj de unu parlamentano.

## Interesoj ignorataj

Pli malbona estas la stato en Slovakio kaj Hungario, kie ciganoj ne havas deputitojn en la tieaj parlamentoj. Tiuj faktoj klare montras, ke la interesoj de ciganoj estas ignorataj de politikistoj en Centra kaj Orienta Eŭropo. En tiu parto de Eŭropo malkaŝe estas tolerataj rasismo kaj superstiĉoj: regas



## Faktoj pri ciganoj:

- 90 % el la 12 milionoj da ciganoj loĝas en Eŭropo.
- ciganoj estas plejparte koncentritaj en la landoj de Centra kaj Orienta Eŭropo.
- ĉirkaŭ 500 000 ciganoj mortis rezulte de la holokaŭsto en la dua mondomilito.
- diskriminacio kaj perforto kontraŭ ciganoj estas larĝe disvastigitaj tutmonde.

malamikemo rilate al ciganoj subtenata de publikaj eldiroj de politikistoj. Tiuj humiligas ciganojn, tiel fortigante tradicie negativan rilaton al ciganoj.

Unu el la plej grandaj tragedioj por ciganoj de la 20a jarcento estas ilia

ekstermado fare de nazioj dum la dua mondmilito. Rezulte estis neniigitaj ciganaĵoj komunumoj en pluraj landoj. Pereis ekzemple 95 % de la ciganoj en Ĉeĥio. Laŭ pritaksoj mortis tiutempe ĉirkaŭ 500 000 ciganoj. Tial ciganoj nun opinias, ke iliaj kompensaj postuloj estas justaj kaj ilia partopreno en intertraktoj memkomprenebla. Fakte, ciganoj konsistigas la solan nacion, kiu ricevis nek financajn nek politikajn nek moralajn kompensojn. Dum la mondkongreso de ciganoj fine de julio en Prago oni alvokis Germanion peti pardonon pro la mistrakto de ciganoj. Krome la kongreso postulis internacian agnoskon de ciganoj kiel memstara nacio. ▶

► La nun okazanta genocido de ciganoj en Kosovo ne eviteblas. Ciganoj tie estas devige transloĝigataj, kaj albanoj „pogromas” kontraŭ ili: oni kredas ilin aliancanoj de la serboj. Tial multaj ciganoj elmigris al Montenegro kaj Makedonio. Novaĵagentejoj informas pri mortigitaj ciganoj en Kosovo sed, malgraŭ la atento de tutmondaj amaskomunikiloj, la cigana batalo pri egalrajteco kaj homa traktado restas ekster Kosovo. Tiurilate malsukcesas internaciaj organizaĵoj: ili nek atentigas nek agnoskas la persekuton de ciganoj en Kosovo.

### Novestigita geto


Krome estas transloĝigataj lastatempe en Eŭropa Unio ciganoj, kiuj sentas sin nesekuraj pro malobservado de iliaj ĉiutagaj homaj rajtoj. Multaj ŝtatoj en kaj ekster EU ŝajne ignoras tian diskriminacion kontraŭ ciganoj. Ekz. en la ĉeĥa urbeto Usti nad Labem oni ĉirkaŭmetis muron ĉirkaŭ la ciganoj, ĉar ili multe bruas kaj ŝtelas: nur post longa debato la ĉeĥa parlamento decidis forigi la muron ĉirkaŭ la novestigita geto.

Negativa estas la situacio de ciganoj en Centra kaj Orienta Eŭropo post la ŝanĝo de komunismo al demokratio en 1989. Tion notis Emil Scuka, prezidanto de la Internacia Unio de Ciganoj (IUC). En Ĉeĥio, Ruman-

io kaj aliaj orient-eŭropaj landoj la mal-egaleco komenciĝas en lernejoj, kie ciganaĵoj aparte edukiĝas, kio poste speguliĝas en alta senlaboreco inter ciganoj. Tial, pro ilia malakcepto en la socio, ili ekkrimas, kio siavice estigas rasisme motivitajn atakojn kaj perforton fare de ekstremdekstruloj. Tial ne surprizas la elmigro lastatempe de ciganaĵoj el Ĉeĥio kaj Slovakio, celantaj ricevi azilon en Kanado, Britio aŭ Skandinavio. Krome ne estas hazardo, ke ĉi-somere 43 ciganoj el okcidenta Hungario veturis al Strasburgo por peti azilon kaj ekprocesi kontraŭ Hungario en la tiea Eŭropa Tribunalulo pri Homaj Rajtoj.

### Regas epidemioj

Multaj ciganoj en Orienta Eŭropo spertas malriĉecon post la disfalo de komunisma reĝimo. Ekz. en Rumanio, ĉirkaŭ Bukareŝto, mizere loĝas miloj da



EVGENI GEORGIEV

Cigana kvartalo en Florenco, Italio.

homoj, inkl. de ciganoj, por kiuj la urba administracio certigas nek forigon de rubo nek fluantan akvon. Regas epidemioj ĉar, pro senlaboreco, ne validas persona malsan-asekuro. Tial en Rumanio en 1990 estis fondita la unua cigana organizaĵo: hodiaŭ ekzistas preskaŭ 200. Rumanaj ciganoj nun estas kulture pli vaste agnoskataj ol antaŭe, sed daŭre en laboro-anoncoj videblas frazo „Ni ne dungas ciganojn”, kvankam antaŭ nelonge ekvalidis leĝo kontraŭ rasismo.

Klerigo kaj sano restas grandaj problemoj: kvankam en ĉiuj okcident-eŭropaj landoj estas garantiata la rajto pri instruado, multaj

ciganoj tamen ne sendas siajn gefilojn al lernejo, ĉar ili ne estas bone vestitaj aŭ ne povas pagi la veturkostojn. Tial okazas, ke ciganaĵoj el eksaj komunismaj landoj ofte montras pli bonajn sciojn ol tiuj en Okcidenta Eŭropo. Daŭre restas mizera sanprotekto por ciganoj: akuŝoj – la unua averaĝe ĉe 17-jarulinoj – ne estas helpataj de kuracisto. Infanmorteco estas granda, naskokontrolo nekonata kaj la vivdaŭro ĉe ciganoj restas mallonga. Kontraŭgravediĝaj rimedoj apenaŭ estas uzataj, kaj sanprotektajn servojn oni uzas nur pro akraj doloroj aŭ pro maleblo plenumi ĉiutagajn devojn.

La IUC-prezidanto, Scuka, interalie atentigas, ke malgraŭ bonaj programoj por integri ciganojn en Centra kaj Orienta Eŭropo tamen mankas mono por realigi la planojn. Eŭropa Unio sendube povus kontribui por solvi la problemojn de la ciganoj tie, kie ili ekestas.


Evgeni GEORGIEV

## AŬSTRIO

# De-mona decido

En 1959 fondiĝis en Vieno la Afrik-Azia Instituto (AAI). Temas pri nepolitika institucio por subteni interpopolan kompreniĝon inter Eŭropo kaj Afriko/Azio. Ĉiujare okazas tie pli ol cent aranĝoj, ekzemple diskutoj, festenoj, seminarioj. Hodiaŭ 90 studentoj el tiuj kontinentoj loĝas tie kaj ricevas stipendion.

Tamen la financa estonteco de AAI nun necertas. Mankas financaj dokumentoj, inkluzive de fakturoj: pastro, kiu gvidis la instituton, posedis nesufiĉan administran talenton. Ofte ŝanĝiĝis la estraro. Tial por



WALTER KLAG

La enirejo de AAI: kiom longe studentoj trauros ties pordojn?



WALTER KLAG

La gazeto „Afrika Tribuno” raportas ĉiumonate pri la vivo de afrikanoj en Vieno.

la jaro 2000 la ŝtato ne pagis la kurtiman subvencion.


Ankaŭ pli ol cent similaj organizaĵoj, por kiuj AAI estas la aktiveca centro, ricevos por la sekva jaro reduktitan financon subtenon. Tio laŭas planon de la aŭstria registaro starigi sendeficitan buĝeton en 2002.

Walter KLAG

# Vira korpo, virina koro

**L**a 72-jaraĝa litova polo Vitold Ĉernis preferas esti nomata sinjorino. Kvan-kam vidvo, kun plenkreska filino, li ĉiam sentas sin virino. Nur dum unu jaro antaŭ sia edziĝo kaj eble samlonge poste li rezignis pri sia virina naturo. Li edziĝis, ĉar li ne volis resti sola, kaj ne ekzedziĝis, ĉar la eklezio ne toleras divorcojn. Li ne volis kunvivi kun viro, ĉar amo kun viroj ne allogis.

En soveta Litovio transvestitoj ne estis tolerataj. Surstrate, portante virinajn vestaĵojn, li ofte estis insultata pro sia nekutima aspekto. Dum multaj jaroj Vitold laboris kiel ŝoforo: kiam unufoje li iris al la laboro kun virinaj subvestaĵoj, kion rimarkis la estro, tiu ordonis, ke li vire alivestiĝu.



LAIMIUS STRAZNICKAS



LAIMIUS STRAZNICKAS

La „sinjorino” ĝis la morto restos kun virina animo. Homoj tuj rekonas, ke sub virina vestaĵo kaŝiĝas vira korpo.

Poste la ĉefo sendis lin al psikiatra hospitalo por akiri atestilon pri lia sano.

En sendependa Litovio oni fariĝis pli tolerema. Tamen transvestitoj restas sensacio. Post kiam Vitold aperis en la televido, li fariĝis stelulo. Multaj laŭdis lin pro lia starpunkto. Li anoncis, ke li volas esti enterigata post sia morto kiel virino. „Ĝis nun neniu povis ŝanĝi mian emon esti virino, kaj tia mi restos”, li diris.

Laimius STRAZNICKAS / pg

# Sekure nesti



WALTER KLAG

Patrinoj, kiuj ne povas prizorgi siajn bebojn, povas ilin „enpoŝtigi” en beboklapon en Hamburgo.

**J**am dum la regado de la germana imperiestro Jozefo Dua (1780-90) en Vieno eblis anonime naski. Tiam naskotino eniris vualite la Ĝeneralan Hospitalon en Vieno, transdonis sigelitan koverton kun sia nomo kaj povis naski – la sigelon oni rompis nur, se la patrino mortis pro naska malfacilo. Se ŝi ne volis havi la infanon, ĝi restis en la hospitalo kaj la ŝtato pagis la mamnutristinon. Pro tio oni sukcese evitis abortigon kaj murdon de infanoj. Monate okazis 100 anonimaj naskoj.

Nuntempe en Germanio 40 novnaskitoj ĉiujare estas forlasitaj de la patrinoj; en Aŭstrio du. Nur ĉiu dua infano travivas. Ekde aprilo 2000 en Hamburgo t.n. „beboklapo” estas je la dispo de virinoj, kiuj pro senespero ne povas lasi bebon ĉe si. La

asocio Ŝterni-Parko realigis la beboklapo-projekton por helpi al infanoj kaj virinoj. La ŝtala klapo larĝas 72 cm kaj altas 30 cm. Ĝi estas komence facile malfermebla, sed post fermo ne denove malfermebla. Malantaŭ la klapo troviĝas konstante varma liteto kaj sensilo, kiu tuj alarmas flegistojn post enmeto de bebo, kiu do estas ĉiam prizorgata kaj la patrino ne povas esti juĝata pro „formeto de infano”.

Ankaŭ en Vieno instaligis „bebonesto” laŭ la hamburga modelo. Ok semajnojn post la enmeto de sia bebo la patrino povas rehavi ĝin – se ne, ĝi povas esti adoptita de fremdaj gepatroj. Baldaŭ eblos ankaŭ anonime naski kiel jam antaŭ pli ol 200 jaroj.

Walter KLAG

La enirejo ĉe la viena „bebonesto” ege diskretas.

WALTER KLAG

# Buda buduaro apud-budapeŝta

Malfacile troveblas ĉiesulinoj en Hungario. Laŭ nova leĝo surstrate kontakti prostituitinon fariĝis krimo. Tamen la virinoj rajtas daŭre labori en t.n. tolero-zono. Lastatempe ekfunkciis zono tia en vilaĝo apud Budapeŝto, kie ĉiujare okazas aŭtokonkurso de la serio „Formulo 1”.

La vilaĝestro permesis konstruadon de ĉiesulinaj budoj, kiujn la polico deklaris laŭjuraj. Kontentaj estis organizantoj de la aŭtokonkurso, ĉar la virinoj ne publike videblis kaj ne ĝenis la spektantaron. Aparte kontentaj estis viroj, kiuj vizitis la vilaĝon pro la aŭtokonkurso. Ili povis samloke profiti de du eventoj. Nur juristoj plendis pro eventuala malobservo de la Kontrakto de Novjorko, subskribita en 1955, kiu malpermesas starigon de bordeloj.

JUHÁSZ Károly/pg

## Monumenta laboro

**A**bundis en Litovio, samkiel en aliaj Respublikoj de Sovetio, monumentoj honore al Lenin – gvidanto de la rusa socialisma revolucio – kaj al lokaj „herooj” de komunismo. Tamen kune kun komunismo malaperis ankaŭ la monumentoj.

Sed en sudlitova urbeto Grutas 59-jaraĝa Viliumas Malinauskas kreis parkon por la plej imponaj, nun superflujaj monumentoj. La parko tamen ne nur distras: kune kun kafejo, informejo kaj administrejo s-ro Malinauskas konstruis du-kilometran vojaron, kiu memorigas, kiel litovoj iris en siberiajn koncentrejojn.



Plej ambicia plano de la park-posedanto celas novan, 121 km longan fervojon inter Vilnius kaj Grutas: la vizitantoj estos ŝovataj en brutvagonojn kaj portataj tra stacioj, kies nomoj memorigos pri plej fifamaj sovetiaj koncentrejoj de GULAG. Atinginte la parkon, turistoj trovos barakojn kaj gardistojn (ludatajn de aktoroj). „Vizitantoj ekkonos, kiel ĉio estis antaŭ 50 jaroj”, klarigis s-ro Malinauskas. Last/pg

## Unuafoja vizito

En oktobro 2000 la Dalai-Lamao, ĉefo de tibeta budaismo, vojaĝis al Nord-Irlando. La ĉeflamao vizitis kaj katolikajn kaj protestantajn kvartalojn de Belfasto, kie ambaŭ komunumoj entuziasme kaj afable bonvenigis lin. Parolante en klara angla lingvo, la gasto pledis por paco. Tiel, unuafoje, la nordirlanda publiko – membroj de du kristanaj konfesioj – renkontis gravan budaiston aŭskultis budaismajn himnojn.

IRL

*Dalai-Lamao*



### PRAHISTORIO

## Paŝtisto de la pasinteco

**La korpo de prahistoria homo, trovita antaŭ dek jaroj en glaciejo en la Alpoj, estos malfrostigita dum difinita tempo, por ke sciencistoj esploru ĝin. La decido sekvas „frostan” periodon, kiam Aŭstrio kaj Italio debatis, al kiu lando apartenas la restaĵoj.**

**L**a korpon, kies aĝo estas pri-taksata je 5300 jaroj, oni trovis pli ol 3000 m super la marnivelo. Sur ĝi estis gamaŝoj el kapra felo kaj herba aldonajo; apude kuŝis kupra hakilo kaj sagujo. Komence oni supozis, ke estas trovita grimpinto, kiu mortis verŝajne pro lavango. Tamen analizo montris, ke la restaĵoj estas la plej malnova kaj la plej bone konserviĝinta mumio ĝis nun trovita.

### Alpa ŝtormo

Malfrostiginte la korpon, spertuloj komencos analizi ĝin. Ili volas klarigi, kiel la viro – ĉ. 45-jaraĝa, 165 cm alta kaj pezanta ĉ. 45 kg – mortis. Oni konjektas, ke alpa ŝtormo



surprizis lin, kaj li frostiĝis. La prahistorian paŝtiston oni nomis Oetzi [eci], laŭ la nomo de la valo, kie turistoj malkovris lin.

Ĉar la korpo estis trovita sur itala teritorio, kvankam nur kelkajn metrojn de la aŭstria landlimo, oni finfine decidis, ke Oetzi restu en Italio. Tie la korpo estas konservata en fridujo kun fenestroj je konstanta temperaturo de -60 celsiaj gradoj. En 1998 la korpo estis ekspoziciata en la arkeologia muzeo de la itala urbo Bolzano [bolcano] en Sud-Tirol.

Evgeni GEORGIEV





## INFANOJ

# Surstrata skandalo

**En Kinŝaso, ĉefurbo de la Konga Demokratia Respubliko, strat-infanoj fariĝas alarma fenomeno. En 1986 ekzistis apenaŭ 6000 tiaj infanoj; hodiaŭ pli ol 20 000.**

**M**ultas la kialoj: manko de edukado, kampara malriĉeco pelanta infanojn urben, morto de gepatroj (interalie pro aids), senlaboreco aŭ alkoholismo de unu aŭ ambaŭ gepatroj, poligamio kaj nekontentigaj kondiĉoj en la hejmo, inkluzive de malico de pli aĝaj fratoj.

Strat-infanoj, kelkaj ankoraŭ ne 10-jaraĝaj, videblas ĉie en Kinŝaso, kie amasiĝas homoj: ekz. ĉe vendejoj aŭ la stacidomo. Ili fariĝas portistoj, lavistoj de veturiloj, ŝuistoj kaj etvendistoj; samtempe tamen multaj krimas. El la strat-infanoj formiĝas grupoj, preskaŭ familioj, ĉiuj kun propra teritorio, identigiloj, koda lingvo kaj eĉ apartaj narkotaĵoj.

Nun la registaro kaj neregistaraj organizaĵoj provas prizorgi la strat-infanojn. Ili funkciigas programojn pri reedukado, por ke la infanoj reeniru la socion. Tamen eĉ se „saviĝas” kelkaj infanoj, restas aliaj ĉiam pretaj surstratiĝi.

Zandandu Ntomono ZOLA / pg

## IRLANDO

# Kiel taksi taksiistojn?

**L**a Irlanda Respubliko ĝuas senprecedentan prosperan konjunkturon. Tamen ne ĉiu partoprenas ĝin. Strikas pli kaj pli da homoj – interalie fervojistoj, instruistoj, flegistoj kaj taksiistoj – kies salajroj ne plu sufiĉas por alfronti la altajn vivokostojn.

Taksiistoj, tamen, krome plendas: la registaro decidis pli libere koncesii permesilojn rilate taksi-servojn en irlandaj urboj. Dum longa tempo taksiistoj konservas kvazaŭan monopolon pri permesiloj, limigante la nombron de taksoj, tiel ke la publiko grumbas pro supozata „taksimafio”. Sekve, en Dublino kaj en aliaj urboj, oni konstante vidas, precipe dumnokte, longajn vicojn de homoj vane atendantaj taksojn.

### Neadekvata

Malgraŭ rapidaj elektraj trajnoj inter urbocentro kaj antaŭurboj, transporto en Dublino res-



*Taksiistoj ne kontentas en Dublino.*

tas neadekvata. Busoj en la ĉefurbo funkcias nur ĝis la 23a 30: nepras taksoj por tiuj, kiuj nokte laboras aŭ vizitas teatrojn. Tamen lastatempe strikis taksiistoj pro la novaj koncesio-planoj de la registaro. Manifestaciante, taksiistoj blokadis la flughavenon kaj paralizis la stratojn de la ĉefurbo.

La plej grava manifestacio okazis, kiam taksiistoj kun siaj familianoj provis marŝi al la parlamentejo, kie iliaj gvidantoj kunsidis kun la vicministro pri transporto. La manifestacio fariĝis tumulto – danĝera kaj por partoprenantoj kaj por policianoj gardantaj la

parlamentejon. Malgraŭ grumbloj pri „mafio”, multaj irlandoj simpatias kun la taksiistoj, kiuj foje hipotekas siajn domojn por pagi la altajn kostojn de takso-permesiloj. Eble la situacio pliboniĝos pro konstruata tram-sistemo en Dublino; plej efika solvo tamen estus metroo, kiu en la irlanda ĉefurbo ne ekzistas.

IRL

# Paca invado

**D**um jarcentoj invadis la irlandan insulon – same kiel aliajn eŭropajn landojn – keltoj, danoj, normandoj, angloj, ktp. Tamen laŭraporte la lasta amasa, kvankam paca, „invado” konsistas el hispanoj, kiuj kiel kuncivitanoj de la Eŭropa Unio rajtas loĝi kaj labori en Irlando sen vizo aŭ laborpermesilo.

Kompreneble irlandanoj rajtas reciproke translokiĝi en Hispanion, sed laŭŝajne la perspektivo por eksterlandaj laborantoj estas tie malpli favora ol en Irlando, kie serioze mankas laborfortoj. Rezulte de la nuna konjunkturo troviĝas en ĉiu parto de la Verda Insulo hispanoj: studentoj, komizoj, kelneroj, teknikistoj, hotelstabanaj kaj, en havenurboj, fiŝistoj kaj maristoj. Precipe la versaĵfama urbo Limeriko spertas grandan alfluron de hispanoj.

### Bruo kaj amuzo

Ŝajnas, ke hispanoj sentas sin ĉehejme en Irlando. Informis juna virino el Galegio, ke „la irlandanoj estas tre similaj al la latinidaj popoloj; ili ŝatas bruon kaj amuzon”. Ŝi plendis nur, ke irlandaj laborkondiĉoj ne lasas sufiĉe da tempo por manĝi kaj siesti.

Fakte, en la pasinteco, ne mankis interŝanĝo de migrantoj kaj komercaj kaj kulturaj rilatoj inter Hispanio kaj Irlando. La urbo Galway (gale: *Gaillimh*) montras fortan hispanan influon: tie situas ekzemple „La Hispana Pordego”. Konata irlanda kanzono nomiĝas „La Hispanino”; ĝi ekzistas en Esperanto-traduko de Margaret Hill kaj William Auld.

IRL



# Historio de la ekonomika pensado

## Parto 2

# La merkantilismo kaj la fiziokratia defianto

Tiu pensmaniero, al kiu oni donis la nomon merkantilismo, dominis kaj la ekonomikan kaj la ekonomi-politikan pensadon dum la 16a, 17a kaj la plimulto de la 18a jarcentoj. Meze de la 18a jarcento defiis ĝin la franca fiziokratismo, kaj poste ankaŭ la klasika skolo.

La terminon *systeme mercantile* oni atribuas al la franca fiziokrato Mirabeau (1749-1791). Kelkajn jarojn poste, en 1776, la klasikulo Adam Smith uzis ĝin en *Wealth of Nations* (Riĉeco de nacioj), kie la merkantilismo estis severe kritikata.

La merkantilismo ne estas unueca skolo kiel la skolastiko en la 13a jarcento kaj la fiziokratismo fine de la 18a jarcento. Ĝi tamen havas kelkajn komunajn elementojn. Unu estas la intereso pri la komerca bilanco kaj pri ekonomia kreskado, kaj la plej multaj merkantilismaj aŭtoroj ne hezitis rekomendi detalan ŝtatan direktadon de la ekonomio por atingi la celojn.

Oni povas rimarki naciajn diferencojn koncerne la emfazon. Germanaj aŭtoroj ofte skribis pri publikaj financoj. En la franca merkantilismo ofte temis pri tio, kiel apogi kaj direkti la industrion – precipe dum la periodo post la mezo de la 17a jarcento, kiam Jean-Baptiste Colbert gvidis la ekonomian politikon. Oni volis apogi ĉefe importanstateŭigan industrion. Hispanaj merkantilistoj interesiĝis precipe pri la akiro de noblaj metaloj. Ilin interesis ankaŭ la proksima demando pri la komerca bilanco. Tiu ĉi estis grava ankaŭ por britaj kaj holandaj verkistoj.

Koncize oni povas diri, ke kun la

merkantilismo la fokuso de ekonomiaj tekstoj iris de moralo kaj justeco al materia prospero. Ni konsideru kelkajn esencajn ecojn.

### Unuiga sistemo

Pro la roma eklezio kaj la latina lingvo, kiu



Colbert (supre) kaj Mirabeau, du francoj kiuj influis la ekonomikan pensadon.



estis uzata en ĉiuj universitatoj, Eŭropo kulture estis sufiĉe unueca en la mezepoko. Alia estis la politika situacio. Tiukampe la malunueco estis granda.

La „regnoj” ofte konsistis el multegaj pli-malpli memstaraj unuiĝoj kun kastelaj sinjoroj, kiuj postulis impostojn kaj doganojn por si mem. Ekzemple tiu, kiu veturis sur Rejno de Bazelo al Kolonjo, devis fine de la 16a jarcento doganpagi je 31 lokoj, t.e. averaĝe en ĉiu 15a kilometro.


La merkantilismo laboris kontraŭ tia malunueco kaj por centralizado. La limoj de la ŝtato determinu unuecan teritorion.

### Potenco kaj prospero

Kiel la ŝtato traktu la ekonomiajn fortojn? Laŭ merkantilisma opinio la ekonomia aktiveco celu plifortigon de la potenco de la propra ŝtato. Ĉi tio estas ofte rigardata kiel la centra celo de la merkantilismo.

Alia merkantilisma celo, kiun emfazis postaj verkistoj, estis la prospero. Temis pli pri prospero de la reĝo kaj de





la komerca elito ol riĉeco de la vastaj tavoloj de la popolo. La sekvaj punktoj rilatas al la kaŭzoj de la potenco kaj prospero de la propra ŝtato, laŭ merkantilisma opinio.

### Protektismo

La eksporto estis favorata. Nia importado eble povus esti rimedo por eksterlandanoj pagi por nia eksporto, sed estus pli bone, se ili pagus per ora aŭ arĝenta mono. Importon oni ofte konsideris maldezirinda. Ĝi estu malgranda pere de diversaj protektismaj rimedoj. Tiel oni havus avantaĝan eksportpluson. La anglo Thomas Mun esprimis tion en la jena maniero en konata libro de la jaro 1630 titolita *England's Treasure by Forraign Trade* (La trezoro de Anglio per eksterlanda komerco): „La ordinara rimedo pligrandigi niajn prosperon kaj trezoron estas la eksterlanda komerco, je kiu ni devas ĉiam observi tiun ĉi regulon: ĉiujare vendi al fremduloj laŭ valoro pli ol ni konsumas de iliaj produktoj.”

Troviĝis diversaj faktoroj malantaŭ tia sinteno. Unu estis la primitiva ideo, ke la riĉaĵo de lando konsistas nur el ties akumulitaj trezoroj de mono, oro kaj arĝento. Adam Smith kritikis tiun ideon, kaj ĝi apenaŭ aperas en sia simpla formo ĉe la lastaj merkantilistoj. Alia faktoro estis la ideo, ke reduktante la importon, oni plifaciligus la situacion por enlandaj produktantoj, kaj sekve la senlaboreco malgrandiĝus.

La opinio pri eksporto kaj importado ŝanĝiĝis fine de la merkantilisma epoko. En la 18a jarcento pluraj merkantilismaj verkistoj parolas pri la reciproka utilo de komerco; do ankaŭ la importado povus esti utila. Malantaŭ ĉi tio oni povas percepti pensojn pri internacia labordivido kaj pri la nenatura kaj malebla okazo, ke ĉiuj nur vendus kaj neniu akceptus.



„Por povi trapasi vi pagu du pfenigojn kaj donacu vinon”. Jen la iamaj kutimoj apud Rejno.

### La defio de la fiziokratoj

La fiziokratismo havis sian centron en Francio. Ofte 1756 estas konsiderata ĝia komenca jaro, ĉar tiam la gvida persono François Quesnay (1694-1774) publikigis siajn unuajn ekonomiajn artikolojn en la granda enciklopedio de Diderot kaj d'Alambert. Ĝi daŭris nur proksimume du jardekojn.

La fiziokratismo povas esti rigardata kaj kiel reakcio kontraŭ la merkantilismo kaj kiel rezulto de ĝenerala agromanio en Eŭropo fine de la 18a jarcento. La vorto fiziokratio originas el la greka kaj signifas proksimume naturpovon. Tio indikas la sintenon de la fiziokratoj. Ili tamen ne mem uzis la terminon fiziokratoj, sed ĝenerale nomis sin *les économistes* (la ekonomikistoj). La grupo estas ofte konsiderata la unua vera ekonomika skolo, kun propra revuo kaj regulaj kunvenoj. Kelkfoje la fiziokratoj estas rigardataj eĉ kiel sekto, ĉar ili estis tre firme ligitaj al sia gvidanto Quesnay.

### Natura ordo

La fiziokratoj kredis je „natura ordo” en la naturo kaj la socio. Ĉar la

leĝofarado estis malbona, estis diferenco inter la efektiva ordo en la socio kaj la natura ordo. La ĉefa difekto estis la merkantilisma politiko kun ties diversaj formoj de subteno por la industrio kaj la eksporto, je kosto de la agrikulturo kaj la konsumado. La natura ordo devus esti restarigita per la forigo de la malbonaj leĝoj. Privata posedado apartenis al la natura ordo. Ĝi estis necesa por allogi la laboron, kiu estis necesa por la prospero de la socio.

Kiam la natura ordo regas, la fiziokratoj trovas harmonion inter diversaj interesoj. „La mirindeco de bonorda socio estas, ke ĉiu laboras por aliaj, kiam li kredas ke li laboras por si mem”, diras Quesnay. Tiun ĉi penson ni poste retrovos en la „nevidebla mano” de Adam Smith, kaj ĝi estas fundamento de la ekonomia liberalismo.

### Pozitiva neta rezulto

La agrikulturo havis centran pozicion en la fiziokrata pensado. Ĝi estis la sola branĉo de la ekonomio, kiu povis doni pozitivan netan rezulton.

Eroj de tiu ĉi ideo estas troveblaj ankaŭ en merkantilisma literaturo, sed la fiziokratoj emfazis, ke por atingi pozitivan netan rezulton, la agrikulturo postulas sufiĉe da realkapitalo en la formo de tirbestoj, brutoj kaj iloj. Tiam oni povus ricevi rikoltojn, kiuj sufiĉas ne nur por resemado kaj por nutri la terkulturiston kaj liajn dungitojn, sed ankaŭ por nutri la terposedantan klason, kiu mem ne prilaboras la teron sed farmigas ĝin.

Oni opiniis, ke la kapablo de la agrikulturo doni pozitivan netan rezulton estas malhelpata de la merkantilismo. Agrikulturo en plena prospero estu restarigata. Oni ne imagas daŭran ekonomian kreskadon, post kiam tiu celo estos atingita.

Agrikulturo povas esti nete produktiva, dum industrioj kaj metioj estas sterilaj en la senco, ke la valoro de iliaj produktaĵoj ne superas la valoron de la „ingrediencoj” konsistantaj el krudmaterialo kaj aliaj produktiloj kaj vivrimedoj de la laboristoj. Sekve, ŝtata imposto estu metata nur sur la netan rezulton de la agrikulturo, t.e. sur la renton, kiun la terposedantoj akiras farmigante la teron. Bo SANDELIN

Pli ampleksa versio de tiu ĉi serio estos eldonita printempe de la germana eldonejo Leins Verlag sub la titolo „La historio de ekonomika pensado”.

# Medio-indulgo de la ĉefaj ekonomiaj sektoroj

Domingo Jiménez-Beltrán, direktoro de la Eŭropa Medio-Organizaĵo (EMO, angle *European Environment Agency, EEA*), lastjare en Bruselo prezentis raporton, kiu skizas la sukceson (aŭ mankon de sukceso) de la eŭropa medio-politiko.

**L**a raporto montras kiagrade ekonomiaj sektoroj dum la pasintaj jaroj adaptis sin al postulo de pli bona konduto el vidpunkto de medio. Estonte EMO ĉiujare aperigos similan raporton. Ĝis nun nur ĉiun kvinan jaron EMO faris ampleksan raporton.

## La ĝenerala situacio ne pliboniĝas

En iuj lokoj estas iom da progreso, en aliaj lokoj emisiado restas aŭ kreskas ... Kvankam la ĝenerala bildo ne estas optimismiga, la nova raporto havas la meriton unuafoje doni detalajn informojn pri ĉiuj gravaj sektoroj. Tiel la respondeculoj facile povas ekscii kie estas la grandaj problemoj kaj en la venontjaraj raportoj ili vidos kie necesas draste interveni.

Estas malpli da damaĝaj emisioj en la aero kaj malpli granda parto de EU estas trafita de acida pluvo. En dense loĝataj regionoj la nivelo

'la ĝenerala bildo ne estas optimismiga'



Domingo Jiménez-Beltrán

## EMO

# Origino kaj funkciado de la Eŭropa Medio-Organizaĵo

La leĝa bazo de la Eŭropa Medio-Organizaĵo (EMO, angle *EEA*) estas akto de la Konsilio de Ministroj el junio 1990 (Reglamento 1210/90/EEC). En 1993 oni interkonsentis loki la novan organizaĵon en la dana ĉefurbo Kopenhago. En 1999 por EMO laboris 70 personoj kun jara buĝeto de 18,1 milionoj da eŭroj.

EMO devas kolekti fidindajn informojn per kiuj la EU-membroŝtatoj povas ellabori taŭgan politikon por protekti la medion. La informkolektado okazas pere de EIONET, grupigo de landaj informretoj.

Ne nur EU-ŝtatoj, sed ankaŭ Norvegio, Liĥtenŝtejno kaj Islando estas membroj de EMO. EMO kunlaboras kun landoj de orienta Eŭropo (la *Phare*-landoj) kaj de la iama Sovetio (la *Tacis*-landoj) kaj kun baltaj kaj mediteraneaj landoj.

## Internacia informinterŝanĝo

La ĉefa, eĉ sola lingvo de la medio-organizaĵoj estas la angla. Tion oni konstatas rigardante la informojn (ekzemple la retpaĝojn) de EEA, Greenpeace, WWF ... Tamen, eĉ la amerika kaj la eŭropa angla malsamas kaj malfaciligas la interŝanĝon de informoj.

Tial, komence de 2000, diversaj esplorinstitutoj (CNR, Italio; US-EPA, Usono; UNEP, UNO; EEA) decidis krei komunan datumbazon pri mediaj aferoj. La datumbazo estas i.a. konsultebla je <http://www.epa.gov/trs>.

Roland ROTSAERT

Noto: Malgranda Esperanto-terminaro pri medio aperis en la revuo VERDire, numero 9, p. 11-14.



de ozono en la surfacproksima aerzono regule superas la limvaloron permesitan de EU. La emisiado kiu kaŭzas la forcejan efikon kreskis en multaj landoj. En la tuta EU oni prognozadas kreskon je 6 % inter 1990 kaj 2010. Tamen, por atingi la celon difinitan en la protokolo de Kioto, necesas malkresko je pli ol 10 %. Kvankam la agrikulturo iĝis pli singarda uzante insekticidojn, ĝi daŭre dependas de uzo de ĉi tiuj ofte danĝeraj kemiaj substancoj. Entute, la eko(logia)-efikeco de la agrikulturo nur iomete pliboniĝis ekde 1990.

La produktado dum 1985-1997 pli rapide kreskis ol la energi-efikeco, kiu grandiĝis nur je 1,4 % jare. Rezulto estas kresko je 13 % de energi-liveroj en tiu periodo. La pli grandaj impostoj je energio ne kompensis la falon de la prez-nivelo.

### Nova indikilo

Unuafoje oni kalkulis la EU-bezonon je primaraj materialoj el la naturo. Ĝi atingas 49 tunojn je persono, kompare kun 45 tunoj en Japanio kaj 84 tunoj en Usono. Preskaŭ 40 % de la materialaj bezonoj venas de ekster la EU.

### Transporto

La energi-efikeco de la transportsektoro apenaŭ pliboniĝis dum la pasintaj 25 jaroj. Kvankam la transportiloj pro teknikaj progresoj konsumas malpli da energio, ili estas pli multnombraj, pli pezaj, kaj malpli efike uzataj. Ĉar la sektoro preskaŭ ekskluzive dependas de fosiliaj energifontoj, ĝi riskas iĝi la ĉefa kaŭzo de acidigaj emisioj en EU.

La pasaĝera kaj vara transportoj pli ol duobliĝis. La porcio de surfaca kaj aera transportoj konsiderinde kreskis. Tion montras ankaŭ la infrastrukturo: la longeco de aŭtovojoj preskaŭ triobliĝis, dum la fervoja reto iom mallongiĝis. La EU-agado por stimuli fervojan kaj akvovojan transportojn kaj por plibonigi publikan transporton mal multe efikis, kvankam kelkloke estas pozitiva evoluo.

La prezo estas decidiga faktoro en elekto de transportilo. Tarifoj de publika transporto pli rapide kreskis ol la kostoj de propra veturilo. La publiko ne sufiĉe konsideras la eksterajn kostojn de transportilo: polucion, bruon, klimatsanĝon kaj akcidentojn. Stimulilo povus esti la impostoj je transporto: anstataŭ jaran fiksan imposton oni povus enkonduki imposton kiu varias laŭ la uzo de la transportilo.

Roland ROTSAERT

## IRLANDO

# Malpli verda insulo

Longan tempon Irlando fieras pri sia publika bildo kiel plej verda kaj ekologie pura lando. Nun, tamen, tiuj irlandanoj, kiuj estas konsciaj pri la endanĝerigita medio, atentigas, ke tiu favora bildo ne plu estas reala. La fonta akvo, kiu iam estis freŝa kaj pura, ne plu estas trinkebla sen antaŭa filtrado; la aero enhavas toksaĵojn, kaj la fama verda pejzaĝo iom post iom malaperas sub la amaso da rubo. Ĉie en la arbaroj, heĝoj, kampoj kaj ĝardenoj milionoj da forĵetitaj plastaj sakoj kaj membranoj flirtas en la vento kaj kuŝas sur la tero. Ĉar la aŭtoritatoj havas nenian efikan longtempan planon por forigi la rubon kaj la forĵetaĵojn, la urtoj kaj la kamparo dronas sub tiu kreskanta torento de balaaĵoj kaj malpuraĵoj.

La registaro kaj la lokaj administrantoj disputas pri proponoj kiel solvi la problemon: ĉu per instalo de cindrigiloj, vastaj rubodemetejoj; redukto, apartigo kaj reutiligo de rubaĵoj; ĉu alie. Malkiel aliaj eŭropaj landoj, Irlando apenaŭ provis la laste menciitan rimedon.

Dum jardekoj neniu irlanda registaro kapablis prezenti longtempan programon pri la protektado de la medio. Simile, mankas longtempa planado pri aliaj gravaj aferoj: ekzemple agrikulturo, enmigrado, urba prikonstruo, transporto, sanservoj, naciaj lingvoj, ktp. Pluraj specialaj tribunaloj kaj policaj esploroj malkovris, ke sufiĉe granda nombro da anoj, adeptoj kaj apogantoj – kaj eĉ ministroj – apartenantaj al FF, la plej granda politika partio kaj majoritata partnero en la aktuala koalicio, estas kulpaj pri korupto.

Ankaŭ la opozicio ne estas tute neriproĉebla. Kvankam la laborista partio kaj la malgrandaj partioj (verduloj ktp) nek estas implikitaj en la diversaj skandaloj, nek suferas de inercio pri mediaj kaj socialaj bezonaĵoj, ili estas malfortaj, malpli influhavaj.

Intertempe, la „Verda Insulo” sinkas sub sia propra rubo kaj ekskremento (kaj en konkreta kaj en metafora senco).


Kvankam gaela proverbo vortumas: „Eĉ la porkino konservas pura sian propran stalon.” IRL

# Kolza oleo anstataŭ benzino

**38-jara litova terposedanto, Alvydas Blazius, ĉi-printempe komencis produkti biodizelinon (biodizeloleon) kaj jam forgesis la vojon al la benzinstacio.**

**P**or agrikulturaj laboroj ĉi-jare li uzis ses tunojn da memfarita brulaĵo. Kiam traktoro laboras sur liaj kampoj, la najbaroj sentas specialan odoron de flanoj. Ili ofte demandas, ĉu biodizelino ne damaĝas la motoron. La bienmastro klarigas: „Mi estas sana, miaj traktoro kaj aŭtobusetoj, kiuj konsumas dizeloleon, same glate funkcias. La nova brulaĵo ne pikas la okulojn.”

La bienmastro konfesis, ke li revas fondi etan fabrikan de biodizelino, kie povus labori 5-6 najbaroj, kaj instaligi biodizelinan stacion. Ĉi-jare liaj kolzoj kreskas sur 50 hektaroj.



*En tia primitiva fabriko Alvydas Blazius ĉiutage produktas 200 kg da kolza oleo.*

Alvydas Blazius asertas, ke unu hektaro da kolzo sufiĉas por kultivi sep hektarojn dum tuta jaro.

Produkti unu litron da brulaĵo el kolza

oleo al la bienmastro kostas 0,44 eŭrojn. Krome la restaĵo de la produktado estas uzebla kiel furaĝo.

La ideo produkti ekologian brulaĵon venis en la kapon de la bienmastro, kiam pasintjare li spertis gravan perdon pro tio, ke la registaro malaltigis aĉetoprezon de kolzoj. Poste li trovis litovajn sciencistojn, kiuj interesiĝis pri la produktado de biodizelino kaj helpis lin fari la planon de la novspeca instalaĵo por brulaĵo-produktado. Por tio la bienmastro uzis grandan parton de malnova tekniko. Entute ĉio kosis nur 2900 eŭrojn.

La produktanto de biodizelino malkaŝis, ke li atendas plikostiĝon de la dizela oleo, ĉar tiam li povus sukcese konkuri kun tradiciaj brulaĵoj. Li ne dubas, ke liaj streboj produkti ekologian brulaĵon certe provokos negativan reagon de petrolaj monopolistoj. Por realiĝo de lia revo mankas nur unu (?) kondiĉo: la ŝtato devus akcepti leĝon pri ekologia brulaĵo. **LAST**

## Purigo de la haveno de Havano

**E**kzistas laborprojekto por purigado de la havana marhaveno, kies unua etapo komenciĝis pasintjare kaj daŭros ĝis 2004. Dum tiu ĉi periodo la lando investos ĉ. 5 milionojn da dolaroj tiucele, laŭ informo diskonigita dum gazetara konferenco en Havano fare de Armando Choy Rodríguez, prezidanto de ŝtata grupo okupiĝanta pri sanigado de la ĉefa marvojo de la insulo.

Laŭplane, dum la unuaj kvin jaroj de tiu ĉi projekto oni laboros por elimini solidaĵojn kaj hidrokarbonojn kaj redukti iom post iom la organikan materion devenantan de la industria kaj urba sektoroj. Oni celas ankaŭ plialtigi la oksigen-nivelon en la maro, malpliigi konsiderinde la malbonodorojn, plibeligi la marbordan pejzaĝon kaj laŭeble maksimume elimini sedimentajn poluaĵojn per rearbarigo kaj efika utiligo de akvofontoj.

La dua etapo de tiu laboro daŭros de 2004 ĝis 2009, kaj ĝi celas plu disvolvi la primediajn reguligojn de la unua etapo. Diversaj landoj, inter ili Germanio, Italio kaj Japanio kune kun la Programo de UN por Evoluo kunlaboras vigle por sukcesigi tiun ĉi planon celantan definitive purigi la havanan havenon.


Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

## Aerhelica boato

Litova entreprenisto Antanas Gedvilas mirigas turistojn, kiuj vizitas la antikvan kastelon de Trakai, per siaj nekutimaj transportiloj. Antaŭ nelonge en la apudkastela lago li elprovis sian nove kreitan aerhelican boaton. Kvankam la hungara aviad-inĝeniero Oszkár Asbóth antaŭ la dua mondmilito jam eksperimentis pri tia veturilo, kiu nun estas uzata multloke en la mondo, la boato de Gedvilas estas la unua tiatipa surakva transportilo, kaj por ĉefe medioprotekta celo, en Litovio.

Aerhelican boaton movas aera helico, kiun turnas kvartakta, 29-kilovata (40-ĉevalpova) motoro. Ĝi estas muntita super boato kaj tial ĝi ne poluas akvon kiel aliaj motorboatoj. La aerhelica boato senprobleme trapasas akvoplantajn obstaklojn kaj povas tragliti marĉajn lokojn.

Naturprotektantoj opinias, ke la aerhelica boato povas esti uzata por turistaj distroj en la apudkastelaj lagoj, ĉar ĝi ne faras grandan bruon kaj ne damaĝas la medion. **LAST**



TRAMOJ


# Publikaltira teknika ekspozicio

Pli ol dek mil interesatojn allogis la „Viena Tramotago” lastjare en la remizo Erdberg.


**M**ultfaceta estis la programo: pregado de medaloj, speciala poŝtejo, ekspozicio de specialaj surrelaj veturiloj, ŝminkado por infanoj. Fortuloj estis invitataj tiri tutan metrovagonon. En pulbazaro oni povis aĉeti malnovajn ŝildojn de tramoj indikantaj la lininumeron aŭ finhaltejon.

Ĉiun duonan horon veturis speciala metrotrajno de la haltejo Erdberg al Simmering laŭ la plilongigo de linio U3 inaŭgurota en decembro 2000.

Pro la kreskanta metrotrafiko – ja samtempe estas konstruataj la plilongigoj de la linioj U1, U2 kaj U3 – necesas pliaj trajnoj. Dum la tramotago eblis admiri kaj trairi prototipon de la nova metrotrajno de tipo „V”. Kooperativo el tri firmaoj liveros dum la periodo 2000 ĝis 2006 entute 61 sespartajn trajnojn, kiuj kostos 384 milionojn da eŭroj. Tiuj



WALTER KLAG



WALTER KLAG

*La nova viena metrotrajno tipo „V” de ekstere ...*

*... kaj de interne.*

novaj trafikiloj estas pli bonaj ol la nunaj jam 25-jaraĝaj en la sekvaj rilatoj:

- trairebleco tra la tuta trajno;
- klimatizitaj vagonoj kaj stiristaj kupeoj;
- tute ebenaj enirejoj inter la samnivelelaj perono kaj vagonplanko;
- minimuma fendo inter kajo kaj veturilo;
- kupeoj por rulseĝoj kaj infanĉaroj;
- fascina aspekto konceptita de artisto;
- plibonigita informsystemo por la pasaĝeroj.

La 163-tunaj trajnoj konsistas el kvar motorvagonoj en la mezo kaj po unu stirvagono kun stiristaj kupeoj ĉe la antaŭo kaj malantaŭo de la trajno. La trajnoj longas entute 111 m, disponas pri 260 sidkaj 1100 starlokoj. Pro la malgranda distanco de la haltejoj la maksimuma rapido estas nur 80 km/h, la akcelo 1,2 m/s<sup>2</sup>. Ĉar Vieno estas monteta urbo, la kuna povumo de la motoroj estas relative granda: 2560 kW. Tiel la trajnoj kapablas facile suprenveturi laŭ 45-promila deklivo.

Walter KLAG

## Adoleskantinoj, karbonataj trinkaĵoj, ostorompiĝoj

Jam de iom da tempo oni suspektas, ke karbonataj (sodaj) trinkaĵoj eble malfavore influas la sanstato de junaj homoj, sed oni neniam klare montris tion. Lastatempe tamen oni enketis (*Archives of Pediatrics and Adolescent Medicine*, junio 2000) ĉe adoleskantaj lernantinoj pri konsumado de karbonataj trinkaĵoj, korpaktiveco kaj ostorompiĝoj (frakturoj). La ciferoj montris senduban statistikan rilaton



inter tiaj trinkaĵoj (speciale la kolao-trinkaĵoj) kaj frakturoj de korpe aktivaĵoj junulinoj.

Kiel okazas tiu rilato ankoraŭ ne estas konate, sed oni supozas, ke karbonataj trinkaĵoj influas la metabolon de kalcio kaj fosforo, sekve la strukturiĝon de ostoj dum la periodo de kreskado. Tio vokas la atenton al publika sano rilate al dieto kaj bonstato de junaj homoj.

Paulo S. VIANA

# Molekula arkeologio por frandemuloj

**M**idaso, reĝo de Frigio, kiu interalie ricevis de Dionizo la kapablon de la „ora tuŝo” (ĉio kion li tuŝis, eĉ la manĝaĵoj, fariĝis oro, antaŭ ol bani sin en la rivero Paktolo, ekde tiam driviganta oron en sia fluejo), ĉiam aranĝis luksan festenon al siaj favorataj gastoj. Post lia morto oni aranĝis riĉegan funebran festenon kaj ties potoj kaj vazoj iĝis trovitaj en lia tombo. P.E. McGovern, molekula arkeologo, analizis la manĝo-restaĵojn. Surbaze de ties rezultoj la arkeologia kaj antropologia muzeo de la universitato de Pensilvanio, Filadelfio, Usono, aranĝis midasan festenon la 23an de septembro 2000. La menuo konsistis el delikataĵoj, kiel safrane marinita kapro kun menta saŭco, spica rostita ŝafido kun lento-stufaĵo garnita per ĝardenkreso, kaj mielkarameligita fenkola torto kun „peknezo” (sekvinbero kaj mielsaŭco). Virbova sango, kiun laŭdire Midaso trinkis por mortigi sin, ne estis en la menuo, kiu cetere kostis 130 dolarojn por muzeanoj kaj 150 dolarojn por nemuzeanoj.

OH

OH

OH

Fonto: The Sciences, sept.-okt. 2000


# Ĉu akvo fluas supren ie ajn en la mondo?

Tiun demandon la sciencpopulariga periodaĵo *National Geographic* respondis jene en sia numero de septembro 2000:

„Akvo fluas kiel gravito diktas: alvalen (malsupren). Tamen geologiaj formacioj fojfoje kreas la iluzion ke ĝi fluas supren, kiel ekzemple en Rio Grande kie ĝi tranĉas la malsupren kliniĝantan tavolaron en la kanjono Sankta Helena.”

Ni povas aldoni, ke akvosurfaco fakte povas leviĝi en relative mallongaj kanaloj, se ties kversekco laŭgrade pligrandiĝas kaj do la rapido malpliĝas. La energioenhavo de la akvo ja estas sumo de la potenciala energio, kiun reprezentas la akvonivelo, kaj la kineta energio, kiu estas proporcia kun la kvadrato de la rapido. Se ni supozas ke la tuta energioenhavo restas senŝanĝa, tio sekvigas ke pro malpliigo de la kineta energio la potenciala energio devas kreski por ke la sumo de la du restu senŝanĝa. Tio signifas ke la akvonivelo devas leviĝi. En la realo estas malkresko de la energio-enhavo pro la froto de la akvo kun la fluejo, sed tio povas esti pli malgranda ol la malpliigo de la kineta energio, do la potenciala energio tamen devas kreski iom, do la akvonivelo leviĝas.

La inundo-defluiga sistemo de valbaraĵo ofte estas kruta kanalo, sur la dorso de la baraĵo, simila al skisalto-remparo. Okaze de inundo la superflua akvo malsuprenkuras laŭ tiu kanalo, kiu ĉe sia fino havas leviĝantan sekcion, ke la akvo ĵetiĝu malproksimen de la baraĵo. En ĉi tiu mallonga kanalsekcio la akvo-



*Escher pravis: akvo ja povas flui supren!*

nivelo leviĝas eĉ pli ol la kanalfundo, ĉar la rapido malkreskas kaj la akvofasko dikiĝas.

Se en preskaŭ horizontala kanalo la akvo alvenas kun tiel granda rapido, ke ĝi superas la rapidon de la propagiĝo de la ondoj (superkrita fluo), laŭgrade la akvonivelo leviĝadas pro la frota energioperdo, sed en certa kversekco – kiel tio kalkuleblas per la ekvacioj de kontinueco kaj de impulso-movokvanto – kreiĝas tiel nomata hidraŭlika salto, kiu signifas relative abruptan (laŭlonge de kanalsekcio ĉ. sesoble pli longa ol la profundo de la akvo) leviĝon de la akvosurfaco, post kiu la akvo fluas plu per rapido pli malgranda ol tiu de la ondpropagiĝo. OH

# La influo de la jida lingvo sur Esperanto

Komence, kio estas la jida (en la zamenhofa tempo, oni diris *novjuda*) lingvo? Ĝi havas nenian parencecon kun la hebrea, sed apartenas al la ĝermana grupo; ĝin parolas la aŝkenazaj judoj en granda parto de Eŭropo, de Alzaco ĝis Rusio. Ĝi naskiĝis en la gettoj de la reĝna regiono, ĉirkaŭ la 10a jarcento, el la meza malnov-germana.

**S**e konsideri la gramatikan strukturon kaj la leksikon, la jida lingvo estas do tre proksime parenca kun la germana, kvankam oni rigardu ĝin memstara lingvo. La leksiko estas naŭdekprocente ĝermana; aldoniĝas kelkaj depruntoj polaj, rusaj, hebreaj. Kaj ĝi estas tradicie skribata per la hebrea alfabeto, kun kelkaj apartaj konvencioj.


Ĉirkaŭ 1880, Zamenhof verkis *Provo de gramatiko de novjuda lingvo*, en kiu li pledis interalie por la alprenado de la latina alfabeto kaj provis starigi gramatikajn regulojn.

Same kiel pri la hebrea, Zamenhof ne faris vastajn depruntojn el lingvo tute nekonata ekster la juda medio. Almenaŭ konscie. Efektive, li sciis perfekte la jidan lingvon: ĝi estis lia ĉiutaga lingvo, kune kun la rusa. Estas do tre verŝajne, ke kelkaj elementoj de tiel bone konata lingvo agis nekonscie en la kreado de la internacia lingvo. Jen kelkaj.

Pluraj vortoj estas fonetike pli jidaj ol germanaj. La vortoj *fajfi*, *flegi*, *funto*, *fuŝi* havas kiel etimon, ĉu la germanajn *pfeifen*, *pflegen*, *Pfund*, *pfuschen*, ĉu la jidajn *fajfen*, *flegen*, *funt*, *fuŝen*. Sed la jida influo estas pli verŝajna en tio, ke la komencliteroj estas „f”, kiel en jida, kaj ne „pf”, kiel en germana. Oni jam rebatis, ke la konsonanta grupo „pf” estas tro specife germana kaj ne konvenas en internacia lingvo: Zamenhof simpligus ĝin konscie al simpla „f”. Se tiel estus, li forĵetus ankaŭ la grupojn „ŝm”, „ŝp”, „ŝr”, „ŝt” (*ŝmiri*, *ŝpini*, *ŝraŭbo*, *ŝteli*), kiuj ekzistas en neniuj ĝermana lingvo, krom en la germana kaj en la jida.

Same, la verbo *ŝtopi* estas pli prok-

sima al la jida *ŝtopen* ol al la germana *stopfen*. Ni aldonu ankaŭ *gliti*, pri proksiman al la jida *glitŝen* ol al la germana *gleiten*. Ankaŭ *ŝati* pli similas al la jida *ŝacen* ol al la germana *schätzen*. Sama rimarko pri *hejmo* kaj *hejti*, pli rekoneblaj en la jidaj *hejm* kaj *hejcen* ol en la ger-



Anstataŭ „mi havas bonan edzon”,  
ŝi dirus „mi havas bonan econ”

manaj *Heim* kaj *heitzen*. Kaj la dirmaniero *hejme* estas tipe jida (*in der heim*); se ĝi venus de la franca *à la maison*, aŭ de la rusa *doma*, aŭ de la pola *w domu*, ĝi estus tute certe *dome* aŭ *en domo*.

## Kelkaj kunmetaĵoj

La vorto *antaŭtuko* estas la preciza

paŭsaĵo de la jida *fartuĥ*, kiu entenas *far* „antaŭ” kaj *tuĥ* „tuko”. La esperanta vorto ne povas veni de la germana *Vortuch*, eble iam uzita, sed de longe ne uzata. Ĝi ankaŭ ne povas veni de la rusa *fartuk*, ankaŭ ne de la pola *fartuch*, en kiuj la elemento *far* ne havas sencon (ĝi estas nur germana depruntaĵo). La sola ebla etimo estas jida.

La vorto *lernolibro* estas la ekzakta paŭsaĵo de la jida *lembuĥ*. La germanoj uzas *Lehrbuch*; se la esperanta vorto estus gemandevena, ĝi estus instrulibro, praktike ne uzata, kaj ne *lernolibro*.

Ankaŭ la vorto *superjaro*, por nomi la 366-tagajn jarojn, respondas al la jida *iberjor*, en kiu oni rekonas *iber* „super” kaj *jor* „jaro”. La responda germana nomo estus *Überjahr*, sed ĝi ne estas uzata: oni diras germane *Schaltjahr*. La rusa *visokosnij god* kaj la franca *année bissextile* estas sen rilato kun la esperanta vorto.

## La uzo de *respondi*

Krom sia ĝenerala signifo „demandite, diri (*respondi al demando*)”, tiu verbo havas ankaŭ specialan sencon: „esti proporcie, simetrie akordigita kun” (*tiu decido ne respondas al la situacio*). Sed nek la rusa lingvo, nek la germana, nek la franca uzas por ambaŭ signifoj la saman verbon. Cetere, multaj francaj esperanto-parolantoj diras erare „tiu decido ne korespondas al la situacio” (kvankam *korespondi* ne konvenas en tiu kunteksto). Sed la jida lingvo uzas la verbon *entfern* por ambaŭ signifoj de *respondi*. Do la jida influo estas ĉi tie, se ne certa, almenaŭ tre verŝajna. ▶

# Fremda animo, abismo sen limo

Hodiaŭ kiam la Respubliko Irlanda pli kaj pli integriĝas en la Eŭropan Union, oni konstatas urĝan neceson koni fremdajn lingvojn por povi konkurenci en la merkato kaj socio pligrandigitaj. Tiu konstato, tamen, ankoraŭ ne estas ĝenerale sentata inter la plimulto de la loĝantaro, kies lingva kompetenteco estis ĝis nun magra kaj mizera.

Aliflanke, laŭ raporto pri lingva kapableco inter plenkreskuloj, eldonita en la lasta numero de *Teangeolas*<sup>1</sup> [tjangjolas] („Lingvistiko”), organo de la Lingvistika Instituto de Irlando, statistikaj donitaĵoj pri la lingva kapableco de irlandaj studentoj montras pli altan nivelon ol en la jaro 1993. (Vidu la Tabelon).

Laŭ enketo „Eŭrobarometro”, la averaĝaj ciferoj por homoj inter aĝoj 15 - 24 en la jaro 1997 estis jenaj:

Kapableco konversacii en fremda lingvo en aliaj EU-landoj: Angla: 54%, franca: 20%, germana: 11%, hispana: 9%. En Irlando<sup>2</sup>: Franca: 44%, germana: 16%, hispana: 3%.

Rim. Por Irlando ne inkludiĝas la angla lingvo, ĉar hodiaŭ ĉiuj irlandanoj (eĉ homoj kies denaska lingvo estas la gaela) scipovas paroli la anglan.

Laŭ ĉi tiu statistiko, la situacio en Irlando aspektas sufiĉe favore komparebla kun aliaj eŭropaj landoj, sed tio estas iom erariga. En la aliaj ŝtatoj, la preferata fremda lingvo estas nun la angla. Malpli multaj lernejoj kaj studentoj nun studas la francan, la germanan, ktp. Aliflanke, en Irlando, kie ĉiu studento jam parolas la anglan, mal-

multaj lernejoj normale instruas fremdajn lingvojn krom la franca kaj la germana (malpli ofte la hispanan, kaj eĉ malpli ofte, la italan).

Kompreneble, pli kaj pli da junaj irlandanoj nun laboras kaj studas eksterlande, do kelkaj sufiĉe regas almenaŭ unu fremdan lingvon.

Ne surprize, la irlandanoj, kiuj pli facile kaj pli bone lernas fremdajn lingvojn estas la dulingvuloj, nome, tiuj kiuj flue parolas kaj la anglan kaj la irlandan (gaelan). Tiuj, kiuj denaske parolas nur la anglan kutime malsukcesas regi (aŭ eĉ balbuti) alian lingvon.

Rilate Esperanton (ne menciita en la artikolo en *Teangeolas*), kvankam estis sufiĉe multe da entuziazmuloj, kiuj lernis ĝin aŭ interesiĝis pri ĝi dum la periodo antaŭ kaj tuj post la deklaro de sendependeco en la frua 20a jarcento,

ekde tiam la nombro de irlandaj esperantistoj draste falis. Tio okazis pro la sama tipa malintereso inter la plimulto da irlandanoj pri lernado de lingvoj. Ili simple ne rekonas la neceson studi alian lingvon krom la angla, asertante, ke „ĉiuj ĉie parolas la anglan”.

Garbhan MacAOIDH

1. *Teangeolas* estas revuo leginda de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri lingvoj kaj lingvistiko. Ĝi estas senpage akirebla de IT é (Lingvistika instituto de Irlando), 31 Fitzwilliam Place, Baile Átha Cliath (Dublino).

2. Respubliko Irlanda.

## Kapableco paroli eŭropan lingvon (1993)

	Nivelo de kapableco (%)		
	Franca	Germana	Alia
Kelkaj vortoj	14	8	6
Malmultaj simplaj frazoj	13	3	3
Eroj de konversacio	10	2	2
Plimulto da konversacioj	3	1	1
Denaskula kapablo	1	1	-

MONATO 2001

## ► La du vortetoj *nu* kaj *ĉu*

La vorto *nu* venas de la jida *nu*, kiu cetere pasis al la novhebrea.

Koncerne la demand-vorton *ĉu*, oni ĝenerale asertas, ke ĝia etimo estas la pola *czy* (proksimuma elparolo: ĉi). Tio estas ĝusta; oni povas eĉ aldoni la slovakon *či*. Sed la jida dialekto uzita en Bjalistoko en la tempo de Zamenhof apartenis al la nordorienta variaĵo, kaj en ĉi tiu variaĵo la demanda vorto estas *cu*. Oni povas akcepti, ke *ĉu* estas la komuna punkto inter la pola *czy* kaj la jida *cu*.

## La vorto *edzo*

Spite kelkajn jamajn neadojn, tiu vorto havas vere jidan originon. Jen ĝia kompleta historio. En pluraj francaj vortoj, ina sufikso estas *-esse* (*princesse*, „princino”). En pluraj germanaj vortoj, ina sufikso estas *-in* (*Lehrerin*, „instruistino”). Sed en kelkaj vortoj, la germana lingvo

kunigas la francdevenan *-esse* kun la germandevena *-in*, kaj tio finvenas al *-essin* (*Prinzessin*, „princino”). Tiu duobla sufikso *-essin* pasis al la jida lingvo sub la formo *-ecin*. Tiel, el *rab* „rabeno”, oni pluformas jide *rabecin* „rabenino”, aŭ pli ĝuste „edzino de rabeno, rabenedzino”. Zamenhof ŝanĝis la literon *c* de *rabecin* al *dz*, tute banale por eviti homonimecon kun la sufikso *-eco*. Li tiel finvenis al *rabenedzino*, el kiu li tiris *edzino*, kaj de tie, *edzo*. Precize same, li retroderivis *kuzo* de *kuzino* (france *cousine*) kaj *fraŭlo* de *fraŭlino* (germane *Fräulein*).

Kelkaj personoj, malkontentaj pro tiu juda origino, plenigis tedajn paĝojn, klopodante pruvi, ke tiu etimologio ne estas ĝusta, kaj ke *edzino* povas veni de la pola *jędza* „furio, malbonulino”. Ili foje aldonis, ke la jida *rabecin* ne ekzistas, aŭ ke *-edzin* ne povas veni de *-ecin* pro malsameco de konsonanto. Estas facile rebati: 1) ke ne ĉiuj edzinoj estas furioj (interalie la mia ne estas tia); 2) ke la

vorto *rabecin* troviĝas tutlitere en miaj du jidaj vortaroj; 3) ke se *-edzin* ne povus veni de *-ecin*, ankaŭ *cigaredo* ne povus veni de la franca-angla *cigarette*, nek *planedo* de la greka *planetes*, ktp. Estas sciata, eĉ de komencantoj, ke tre ofte Zamenhof ŝanĝis en radiko unu literon por eviti ŝajnan sufikson: *faruno* kaj ne *farino*; *pilolo* kaj ne *pilulo*; *makzelo* kaj ne *maksilo*, kaj multegaj aliaj. Se li restigus la *c* de *-ecin*, mia *edzino*, anstataŭ diri „mi havas bonan edzon”, dirus „mi havas bonan econ”, kio estus katastrofo dusenca. Ni estu seriozaj! Neniel Zamenhof kapablus allasi tian fuŝaĵon.

Cetere, tiu jida etimo de *edzino* estis parte klarigita de Zamenhof mem (*Lingvaj respondoj* n-ro 48A, p. 28). Kaj la klarigo estis kompletigita de G. Waringhien (*Lingvo kaj Vivo*, p. 7). Ĉu la parolo de Zamenhof kaj la scienco de Waringhien ne sufiĉas por forigi ĉian dubon?

André CHERPILLOD



de Higinio García

# El la atesto de Mustafao Vanesavir', submastro

dum laborkunveno por persona  
kreskado de mezaj kadroj la  
10an de laboralo '86

**Ĝ**uste: kvazaŭ diulo en sia mistika migdalo. Stefankarlo ĉiam ŝajnis al mi dio, kiam li sidis ĉe sia skribotablo, kadrita de la alta dorsapogilo de lia fotelo, milde lumigata de la ovala fenestro malantaŭ li. Li estis ĉirkaŭata de l' fumo de sia pipo, kiuj dancis, oni dirus, laŭ la mallaŭta klasika etosmuziko. Li ĉiam estas ĉirkaŭata de etosmuziko, klasika kaj mallaŭta. Kaj de l' fumo de sia pipo. Tio helpas al li sin koncentri kaj aktive aŭskulti. Li plaĉe ridetis, sed ne parolis al mi. Li, laŭkutime, aktive aŭskultis, ĉar li sentis ke mi bezonis esprimi min. Tio estis la vero, kaj mi malkovris al li ĉiujn miajn emociojn. Mi diris al li:

„Mi sentas ke se mi dirus al ŝi ke ŝi foriru, ŝi foriros, kaj ŝi neniam revenos. Sed mi neniam tion diros al ŝi. Ĉar mi estas alkröĉita al ŝi, mi bezonas ŝin tiom, kiom ŝi bezonas mian vivsukon, mian vivon. Ĉu vi scias, Stefankarlo? Ŝi ne havas propran vivon. Ŝi estas vampirino. Ĉu vi scias ke ŝi vivas elsuĉante, krom la sango, la ĝojon kaj la vivenergion de la aliaj? Kaj nun, mi ne scias kiel akumuli sufiĉe da energio por nutri tiun frenezon mian nutri ŝin”.

Li, Stefankarlo, kun tiu saĝeco kiun li havas, elpompis fumon el sia pipo - kaj mi, malpie, mi tion konfesas al vi, malpie mi esperis ke ĝi estos estingita. Vane. Stefankarlo divenis miajn pensojn - kaj triumfe lanĉis zeniten iujn fumcirkletojn.

„Ne, Mustafao Vanesavir'”, tion li diris al mi, „mia pipo ne estingiĝis. Fakte, ĝi estingiĝas nur kiam la tuta tabako jam forbrulis. Evidente, necesas ami sian pipon kaj bone scii kiel ĝin fumi...”

Jam, nur rigardante la fumon, mi iĝis pli paca, pli serena. Kia mistero enestas en tiu pipo kiun Stefankarlo nur unufoje ekbruligas, kaj tamen ĉiam kaŝe brulas? Stefankarlo ankaŭ divenis kion mi demandas al mi mem. Li akomodigis plenigante la tutan fotelon (li ĉiam akomodigas por diri ion gravan, mi bone konas lin).

„...Kiel necesas ami kaj funde koni virinojn”, li diris al mi, „se oni ne volas ke la amo estingiĝu. Jes. Vanesa suferigas vin. Sed, se ni pozitivizu la aferon, tio montras ke ŝi ne estas indiferenta por vi. Ke vi amas ŝin. Ke ŝi amas vin. Ke amo, eĉ senfume, brulas”.

► „Ĉu min? Ke ŝi amas min?”, tion mi demandis al li.


„Evidente. Ĉu ŝi ne ĉiufoje revenas? Ĉu ŝi ne ĉiam rakontas al vi kun kiu ŝi estis kaj kion ŝi faris dum siaj eskapoj? Ĉu tio ne montras ke, funde, vi estas ŝia plej intima komplico? Nur, vi havas tro varman sangon, kiu facile bolas: sangon de ĉasisto karnovora. Manĝu terpomojn kaj evitu viandon. Ĉu vi scias ke Adam Smith asertis ke irlandaj junulinoj bonfartas fizike kaj anime ĉar ili sin nutras precipe per terpomoj? Kaj meditu. Ĉu oni jam donis al vi mantron? Kredu min, Mustafao, ne divorcu. Ŝi ne meritas tion. Ni ĉiuj en la Departemento amas kaj ŝatas ŝin. Kaj ni ĉiuj ĵaluzas vin, ĉar ni scias kiom ŝi povas esti oferema kaj sindona”, tion li respondis al mi.

Stefankarlo pivotigis sian grandan fotelon, turnis al mi la dorson, kaj koncentriĝis en sia komputilo, por lasi al mi la tempon (mi bone konas lin) konscii miajn emociojn. Tiam, mi sentis kiom mi amas mian direktoron, mian amikon. Ne, ne kiel oni amas virinon, ne konfuzu ĉion. Ne kiel mi amas Vanesan. Kaj jes, mi amas Vanesan. Sed tio estas komplementa amo. Masklo kaj ino. Pozitivo kaj negativo. Jango kaj jino. Oni suferas kaj suferigas per tiaj altiroj. Kontraŭe, mi amas Stefankarlon per natura vibrado, per natura pozitiva kunvibrado inter mi kaj li. Per identigo. Mi bezonas lin kiel membro la korpon, kiel ero la tuton.

Mi jam sentis tion - ne ekzakte tion, sed ion iel kvazaŭ ion tian - antaŭlonge, en la Lernejo, dum Meditado, per la mantro kiun la guruo donis al mi: „imu-uri” (kiel sciis Stefankarlo ke mi havas mantron?). Kvankam ne estis necese, la guruo, kiu estis tre klera viro, diris al mi ke tio, en la antikva usona, signifas „Mi estas vi, vi estas mi(1)”. Nun, tiu mantro plene sencas. Oni povas diri ke mi kaj Stefankarlo havas la samajn emociojn, la saman manieron vidi la mondon... kvazaŭ mi kaj li estus du korpomembroj de unu sama estaĵo.

Ververe, ni ĉiuj estas la sinergiaj membroj de Natura Entrepreno, de la Uzino. Kaj, kiel ĉio en la Naturo, ni ĉiuj estas necesaj al ĉiu alia. Ĉiu estas en ĉio ĉar ĉio ĉeestas en tio...: mi volis diri... sed vi komprenas min, ĉu? Mi konscias la Ĉion en mia koro, mistike kaj holisme(2).

Nu, Vanesa tiajn aĵojn ne komprenas. Ŝi eĉ ektimas



min, ĉar ŝi insistas ke mi havas demonon. Jen vampirino kiu akuzas normalan viron havi demonon! Ĉu vi tion kredus! Certe, ŝi revenas al la superstiĉoj de sia naska sovaĝa stepo. Aliffoje, kiam ŝi reprenas pli civilizitan vortaron, ŝi insistas ke mi havas „viruson”. Eble oni diradas tion al ŝi ĉe l' tavernoj de l' laboristaj kvartaloj, kie ŝi nun iras ĉasi siajn amorantojn. Ja, estas legendo ĉe l' simpluloj ke la pilolo de Profesoro Ŝvumka, la Direktoro pri Sentomanagerado, vi jam scias, tiu pilolo kiun la Uzino donacas al la edzo dum geedziĝoceremonio por plifortigi amon al la edzino, fakte plifortigas amon al la estro. Absurdaĵo. Ĉu necesas enmeti demonon aŭ viruson en pilolon por ke oni amu kaj obeu sian superulon? Ĉu homoj - almenaŭ, civilizitaj homoj - ne emas nature, volonte, spontanee, reflekse obei?

Estas vere ke, lastatempe, mia flarsenso tiel perfektigis, ke mi kapablas nun diferencigi la odorojn de Stefankarlo en distanco de dek metroj kaj percepti lian animstaton, liajn zorgojn kaj dezirojn, nur flarante la aeron. Sed ankoraŭ tio estas normala afero. Mi iam vidis holovidprogramon kie oni eksplikis ke animstato influas digestadon. Kaj ne necesas esti ia klerega Doktora Moŝto por kompreni ke oni digestas en la digesta aparato, kies ekstremo estas ĝuste la plej odorelsenda parto de l' korpo. Kie diable la demono? Kie estas la viruso? Ĉu ne simpla sens-akreco?

Ankaŭ estas vere ke, nun, mi flaras kion mi devas fari antaŭ ol Stefankarlo ion ajn indikos al mi. Tiel, ke oni dirus ke, ankaŭ li, ektimas min. Ne, li ne evitas min. Nia direktoro tro bezonas subulon kiu flaras la farendaĵojn antaŭ ol ili estas diritaj. Sed li estas maltrankvila. Ekzemple, kiam mi devas preni dosieron en la ŝranko malantaŭ li, mi jam rimarkis ke li manovras por neniam turni al mi la dorson. Eble, pro tio ke li ne volas ke mi eltrovu novan taskon tuj farendan.

Kaj, ĉar mi flaras ke Stefankarlo estas maltrankvila, ankaŭ mi estas maltrankvila.

„Sed diru, Mustafao, kio okazas al via kapo?”

„Mia kapo? Ĝi estas tie, kie ĝi estis ĉiam. Almenaŭ, tio estas kion mi pensas. Aliaj povas pensi alimaniere, ili estas liberaj, kaj mi respektas ilian opinion”, tion mi respondis al li. „Nu, kio do, pri mia kapo?”

„Hm...”

# El la esprimado de Vanesa Mustafaoa, vampirino

## dum grupdinamiko por seksaj minoritatoj la 15an de hipotekalo '87

**M**i kuŝas kun multaj buboj. Sed neniu, kredu min, neniu min amoras kiel amoris min tiu ulo. Kun Stefankarlo kaj la aliaj samsukeraĵoj, mi kuŝas por plenumi mian devon de bona edzino, por puŝadi la karieron de mia edzo. Ho, tio ne estas facila devo, mi ĵuras: mi abomenas tiun skolopendron ĝismorte. Mi abomenas lian manion relativizi niajn rilatojn, maksimumizi nian plezuron - ho jes, „relativizi” kaj „maksimumizi”, li diras. Tio estas, li eksplikis al mi enlite, pli sinergia, pli scienceca kaj pli poraktiva ol simplaj „igi”-; mi abomenas lian blankizitan rideton, lian brilizitan hararon, lian viagrizitan kaceton: mi

abomenas ĉion; ĉe li, ĉio deziregas al mi mordi lin ĝis elsuĉi lian tutan sangon. Sed estas neeble. Nur gustumi tiun siropon estas kiel engluti tutan poton da senpana marmelado. Oni restas marmeladizita kaj oni vomas dolĉaĵojn dum tuta semajno. Ne, kredu min, mi amas nek Stefankarlon nek lian sangon: se mi amoras lin, estas nur pro tio, ke mi amas mian edzon, kies karieron mi devas puŝi, ĉar mi estas lia laŭleĝa edzino.

Sed kien iras tiu kariero...? Oni vere povas diri ke ĉe l' diablon...

Kun la Anarĥiisto - havu li bonan reenkarmoniĝon, povruleto! - mi kuŝis... bone, ĉar lia sango, kun tiu

herbo kiun li fumis, havis siaspecan spicon. Sed precipe, antaŭ ĉio, por boligi la sangon de mia Mustafao, ĉar vi scias ke li malamegis la Anarhiiston. Ho, kompare kun tiu ĥemiaĵo, kiom nature spica, kiom ŝpruca kaj ŝaŭma estis la pika, la sala sango de mia ĉasinto kiun mi tiom amis, de mia Mustafao, kiam ĝi bobelis kaj surpris al mia kapo kvazaŭ ĉampano!


Ĉe mia naska stepo, antaŭ ol Mustafao ĉasis min, mi frandis nur ratojn kaj hundojn. Sed de kiam li ligis min kaj perfortis min kaj civilizis min, kaj mi unuafoje pikis al li la gorgon kaj suĉis iom da lia sango, li konigis al mi la guston de vira sango, de sango bolanta pro kolero kaj frustracio. Li amigis kaj ŝatigis al mi la homaron kaj la civilizacion.

Nur lastatempe, ĉar Mustafao preskaŭ ĉiam estas tro okupata je sia laboro kaj pri sia Stefankarlo, mi hantas laboristajn drinkejojn ĉe mallumaj stratetoj, por ĉasi iun naivan amĉasiston, kies sangon mi devas rapide elsuĉi antaŭ ol ĝi glaciigis pro teruro. Vi komprenu: laboristoj estas la solaj kies sangon oni povas elsuĉi ĝismorte, pro tio ke ili ne pagas sufiĉe kostajn asekuojn por ke iliaj familianoj persekutu. Sed ankaŭ tion mi faradas nur por min distri, kaj samtempe maltrankviligi mian ulon, ĉar mi konas lian timon, ke min trafu viruso. Ĉu li rajtas paroli, li!

Sed fine, nek la lacerta viskozajo de Stefankarlo, nek la vejnaj ĥemiaĵoj de la Anarhiisto, nek la glacia likvaĵo de tiuj kelkaj uloj kiuj komencis sian vesperon sur la lito kaj ĝin finis en ĉerko, iam donis al mi tiun ardan plezuron kiun estigis ĉe mi la sango de mia viro... kiam mi ankoraŭ estis lia predo, kiam li ankoraŭ estis mia viktimo!

Mi jam faris ĉion por rekonkeri lin. Vane.

Mi paŭtas kaj min enfermas en ŝranko: li komprenas kaj akceptas min tia, kia mi estas. Mi frakasis lian novan veturilon en trafika akcidento: tiaj aĵoj okazas. Mi perdas liajn ŝlosilojn: li farigos aliajn. Mi aĉetas vestaĵojn kiujn mi surmetas nur unu fojon: li trovas min bela. Mi ŝanĝis la tutan meblaron sennecese; mi butikumas per lia karteto ĝis transpaso de kreditlimo; mi aĉetas... eĉ librojn mi aĉetas: li redatigos siajn



partopagojn.

Mi faras scenojn kaj ĵetas al li legomojn dum liaj meditadoj. Li: nek frapon, nek krion. Ne la plej etan koleron, eĉ ne malpaciencon. Li digestas siajn terpomojn kaj sian mantron kun sia nervoziga serena rideto. Kaj kun tiu sama rideto, foje, sed malofte, li prenas min je la talio: „Ĉu tentus vin ke ni iru en la liton?” Nun, li parolas kiel la Stef... Li amoras min kiel edzo zorgema pri l' bezonoj de sia edzino devas fari: malrapide, ĝentile, ĝis fine li prezentas al mi la gorgon, por ke mi atingu, por ke mi elvivu mian orgasmon („elvivu”, li diras nun, kiel... divenu, do, kiu nun instruas al li fikadon). Nu, spite lian tenerecon (ŝajnas, ke nur tio gravas, tenereco), mi elvivas nek mian orgasmon nek lian organon (ĉi tiu, se diri la veron, estas ĉiufoje pli mola kaj malpli volumena): nur etan naŭzon, ĉar lia sango, de sala kaj

spica, iĝas nun forpuŝe dolĉaĉa kaj varmeta. Precipe, mi pensas, kaŭze de tiuj terpomoj kiujn la Stefankarlo konvinkis lin manĝi, ĉar la Granda Profeto Adamo Smit diris ke ir...teraj junulinoj, aŭ io sama, bone animis pro tio, ke ili estis farĉitaj per terpomoj antaŭ fizikado. Nu, bone, mi ne estas certa pri l' dirado de l' Granda Profeto Adamo Smit. Sed pri tio, ke nun mia ulo estas farĉita per terpomoj, pri tio, mi estas certege certa.

Li simias la Stefankarlon, kiu hantas lin, kiu obsedas lin, kiu fine posedos lin. Ĉu vi kredus ke mia viro, mia Mustafao, ĵetis al mi ke, inter mi kaj li estas nur interŝanĝo de energio, ĉiam de li al mi? Kaj ke, inter sia Stefankarlo kaj li, estas poraktiva sinergio por produkti kaj evolui? Kia umo estas „poraktiva sinergio”, ĉu vi povas tion diri al mi? Satana aŭ virusa afero: kiel vi volu. Li certe perdas sian kapon. Almenaŭ, ŝajnas al mi ke ĝi malgrandiĝas, kiel lia virilo.

Nun, mi timas lin. Mi kredas ke li havas demonon. Aŭ tion kion vi, la civilizitaj, nomas viruso. Estas la sama afero. Ni ĉiuj en la stepo scias ke la plej teruraj demonoj estas la plej malgrandaj, tiuj kiujn oni ne povas vidi.

Ho Patro Vlad-Drakulo! Se estas vere ke vi ankoraŭ vivas dum plenlunaj noktoj, venu, helpu vian filinon!

# El la komuniko de Zefiro Lapalpo, motivologo

dum perfektiga kunsido de psikoteĥnologoj la 22an de bilancalo '89

**M**algraŭ ĉies supozoj, Stefankarlo venis. Kaj ĉiu aplaudis tre forte, ĉar la tuta dungitaro sciis, ke li vere ne havas tempon, ke tempo de ekzekutivo ĉiam estas peze hipotekita.

Sed Stefankarlo, kiel Departementestro, ne povis ne meti sin sur la saman nivelon kiel siaj subuloj; li faris miraklon: li etendigis la tempon, li venis kaj li restis.

Kaj ne nur dum la oferado de pojnholovidiloj al la ĉijaraj pensiitoj, je la sepa. Kaj ne nur dum la skeĉoj pri la ĉijaraj departementaj okazaĵoj je la oka. Kaj ne nur dum la tostoj je la deka.

Kiam je la dekunua oni mildigis la lumon ĝis preskaŭ nevidebleco kaj oni intensigis la sonon ĝis preskaŭ surdigo, li ankoraŭ restis, kaj ĝentile dancis kun

Amelia, kun Ĉarlina, kun Jasmena, kun Karino, kun Lajla, ...kun Veronika. Fidante miajn konsilojn, mi devas diri, de ĉiam li sin devigas danci, kaj, laŭeble, kuŝi kun la edzinoj de siaj subuloj, por esperigi al ili karierpuŝon kaj motivi produktivecon. Eĉ kun mi li dancis tangon, ĉar li ne havas masklistajn antaŭjuĝojn.

Je la unua, post la tangoj, preskaŭ ni ĉiuj estis torsonudaj. Nur Mustafao jam estis tute nuda. Tamen, li ne dancis: li sin tenis en angulo de l' salono, kaŭre, kun la mandorsoj surtere kaj la okuloj fermitaj, oni dirus gluitaj. Lastatempe lia aspekto multe ŝanĝiĝis. Lia kranio estis konuse pintiĝinta, kaj liaj palpebroj pli kaj pli fermiĝis pro miopeco. Fakte, mi pensas ke li tiutempe estis preskaŭ blinda. Kiam oni tion rimarkigis al li, li ►

► respondis „Sed mi kompensas per mia flaro. Nu, kio do, pri miaj okuloj?” En tiu momento, li estis flaranta per siaj grandiĝintaj naztruoj, kiuj etendiĝis preskaŭ sur la tuta vizaĝo (li denaske estas iom platnaza, sed lastatempe, lia nazo estis preskaŭ manĝita de l' naztruoj)... sed kion mi estis diranta... ho, jes, li flaris en la direkto de Stefankarlo kaj Vanesa. Malgraŭ la milda lumigo, aŭ eble pro tio, oni bone vidis lin, ĉar ŝvito densa kiel vazelino elgutis el lia kranio kaj briligis lian tutan korpon.

Je la tria, dum la slovoj(3), ni estis nudaj. Nur kelkaj aliaj kaj Stefankarlo surhavis ankoraŭ sian pantalonon.

Li ankoraŭ kaj ankoraŭ slovis kun Vanesa, karespalpis, knedis ŝin. Ŝi lasis Stefankarlon fari, malgraŭ siaj enuo kaj senplezuro, pro ia lasta heroa strebo savi sian edzon. Mi scias tion, ĉar mi bone konas Vanesan: ni kune ĉeestis kelkajn grupdinamikojn por seksaj minoritatoj. Ne, ne ke ni gejoj... Ho, jes, mi volis diri ke Stefankarlo slovis kun Vanesa. Ŝi eĉ ridetis. Sed estis minaco ĉe ŝiaj kojndentoj. Mi sentis ke, antaŭnelonge, ni havos novan departementestron.

La dancejo estis malgranda, la dancantoj estis premataj inter si.

Tial, kiam Stefankarlo sentis karnan pinton plumbalaj liajn gluteojn, li distre rigardis. Li vidis nur la nukon de slovanto tiel okupata kiel li mem. Mi supozas ke li pensis pri hazardo: ekscitita dancanto, komponante dancturion, turnis la dorson al sia partnerino. Tamen, dum slovo? Eble li eĉ pensis ke mi, tro drinkinte, uzis miajn ŝancojn. Kvazaŭ li ne sciis ke mi drinkas nur ceposukon, por ne toksigi mian perceptokapablon! Ĉu mi diris ke li ne havas masklistajn antaŭjuĝojn? Ne, mi ne volas diri ke Stefankarlo estis konscie gejojfobo, ne, sed... Bone, mi daŭrigas.


Estis malfacile al li rigardi malantaŭen, ĉar nun Vanesa ekpiketis al li la gorgon, eble kun la intenco fine elsuĉi lian tutan sangon. Ŝi eble estis decidinta fini „la” Stefankarlon, eĉ riskante diabeton. Mi sentis tion. Sed antaŭ ol ŝi eltirus el li la plej etan sangoguton, li paliĝis kaj komencis tremi, ĉar la karna pinto pli kaj pli bekis lian pugon, pli kaj pli inter la du gluteoj.

Li reagis kun furoro. Li frapis malantaŭ sin per sia tuta forto. Malgraŭ la muziko, oni ĉie aŭdis la frapon. La apudaj paroj ĉesis danci, kaj oni lasis malplanan spacon ĉirkaŭ li. Ankaŭ Vanesa, kiu jam de longe antaŭsentis tion, kio fine okazis, sin retiris, venkita kaj deprimita. Embarasite, li rigardis ĉirkaŭen, sed vidis nenion.

La karna pinto frotetis liajn genuojn. Estis la kranio de Mustafao.

Mustafao, el kies naztruo fluis fadeneto de sango pro la ricevita frapo, kies lango pendadis por tuja obeo, rigardis la ĉefon per okuloj larmetantaj pro sufero kaj amo, atendente... fakte, postulante lian decidon.

Neniu dancis plu. Por malstreĉi la atmosferon, mi ŝanĝis la slovon al duoblapaŝo(4) kaj klakis laŭritme per la manoj. Aliaj akompanis min, kuntrenante la tutan ĉeestantaron bati la duoblapaŝan ritmon. Tiel, mi celis ke



ĉiuj motivigu Stefankarlon kaj Mustafao kreative surpreni sian evoluon, ĉar, kiel vi certe scias, la unua leĝo de l' motivologio estas ke oni devas sentigi al la motivenda, aŭ motivendaj tiukaze, ke oni persone estas implikata en ties... Pardonu. Mi daŭrigas.

Kvankam Stefankarlo estis nek gejo nek duseksulo, sed klare kaj definitive heteroseksa - ho, mi bone tion scias! Tia bela viro! - , Vanesa malaperis el lia konscio. La mantra de Mustafao onde plenigis lin: „imu- uri”: „mi estas vi, vi estas mi”.

La sensaco ne devis esti malagrabra. Ĝi devis esti kvazaŭ ondo de homa empatio, de varma kompreno estus invadanta lin. Kvazaŭ lia korpo estus ŝanĝiĝanta de fermita al malferma surfaco. Kvazaŭ la universa vibrado estus eniranta en lin tra liaj oreloj, liaj naztruoj, lia buŝo.... Kvazaŭ la Destino estus frapanta, per tiu karna

pinto, je la sola pordo de lia korpo kiu ĝis nun restis fermita por la Ĉio. Mi bone konas, pro sperto kaj empatio, kion oni kaj kiel sin sentas, kiam la Destino frapas je la pordo. Do, mi pli laŭte batis la ritmon, kuntrenante la aliajn, por helpi Stefankarlon malfermi la pordon por lia destino. La motivologia literaturo demonstras, kaj mi estas persone konvinkita, ke malapero de estro motivigas subulojn, ĉar ĉi tiuj esperas anstataŭi lin. Cetere, bonvolu rimarki, ke mia laboro de teĥnologo pri motivologio ne estas motivi nur ekzekutivojn kaj submastroj, sed ankaŭ la tutan... Sed mi alvenas al la fino.

Mustafao, do, levis la dekstran manon, kaj karesfrotis la kruron de Stefankarlo. Oni pli kaj pli forte batis la ritmon de l' duoblapaŝo. Poste, ankoraŭ kvarpiede, li retiriĝis de Stefankarlo. Evidente, ĉi tiu ne povis plu rezisti al la kosma konscio kiun revivigis ĉe li la ritmoj de l' marŝo kaj de l' manklakoj. La kunfandiga amo de l' profunda Mi fine venkis la narcisecan amon de l' supraĝa egoo. Li finvenkis sin, malrapide demetis sian pantalonon, ĝin turnis per sia montra fingro, kaj lanĉis ĝin, triumfe, for de si, al Vanesa, kies vizaĝon ĝi frapis. Ŝi ĉesis plori, kaj restis statue senmova. Iuj aŭdis ŝin sibli „Mi kaptos vin, skolopendro”. Li, majeste, levis la manojn kaj la kapon ĉielen, turnis la dorson al ŝi kaj genuiĝis, kvazaŭ gladiatoro kiu spitas sian kontraŭulon. Tiam Mustafao, sin impulsinte sur la muro de l' salono, ĵetis sin en sian superulon, kies lasta korpa pordo, jam sufiĉe malfermita, refermiĝis ĉirkaŭ la kolon de l' subulo.

La ĉeestantoj, parto da kiuj jam vidis tiajn scenojn, freneze aplaŭdis kaj kriegis „o le!”, kiel al gladiatoro.

La nova estaĵo ĝojbekis kaj forkrablis okpiede, zigzagante, neniu scias kien, por kompletigi sian metamorfozon.

Kaj nun, por fini, permesu al mi unu lastan rimarkon. Se la destino de Stefankarlo, kiel la Destino ĉiam faras, ne estus tiom ĝustatempe frapinta je la pordo; aŭ se Stefankarlo estus rezistinta al ĝi, li antaŭnelonge estus ricevonta sian sesmonatan kompensan salajron, ĉar la Departemento de Varneniigo devas esti aneksita al la Fako de Prezoprotekto. Sed li tion ne sciis.

Jen, mi sendramigis la krizon.

Dankon pro via atento. ■

## NOTOJ DEL ĤRONIKISTO:

(1) Mustafao Vanesavir' transdiras tie la hipotezon de la tiutempe aŭtoritata usonologo Ŝinto Ĉen, laŭ kiu „I M U U R I” estus grafio simpligita el „I am you, you are I”. Nuntage, tiu hipotezo estas konsiderata kiel lerta kaj brila, sed nesufiĉe konvinka, ĉar ĝi ne eksplikas la parapsikan efikon de la mantra. Oni diskutadas pri bogomila ekpreĝo, santeria sorĉo aŭ sumera rita formulo (Noto de la ĥronikisto).

(2) Holismo: psikoteĥniko por konscii la organizan Principon de la Naturo.

(3) Slovo: malrapida ritmo, kiun la paroj dancas brakumitaj.

(4) Duoblapaŝo: ne tro rapida, sed brila marŝo, ludata dum paradoj kaj triumfoj de gladiatoroj.

# IĈK-reguloj haveblaj al komercistoj

IĈK (Internacia Ĉambro de Komercio) eldonis, komence de ĉi tiu jaro, novan version de Inkotermoj. Tiu teksto estas regularo uzata en la tuta mondo de komercistoj, juristoj, transportistoj kaj asekuristoj por interkonsenti pri la samaj kondiĉoj en la kontraktoj subskribitaj.

Kiam iu firmao el Finnlando vendas siajn varojn al iu alia firmao el Brazilo, kiu pagas la transporton, la asekuron, kaj ĝis kie? Jen la demando, al kiu celas respondi Inkotermoj. Elektante unu el la 13 Inkotermoj, vendanto kaj aĉetanto certas pri ĉiuj kondiĉoj de la vendo.

Ekzistas kvar familioj de kondiĉoj, depende de la respondeco de la vendanto aŭ de la aĉetanto. La sola kondiĉo de la

„E”-familio, „E X W”, precizigas la liveradon de la varoj fare de la vendanto en lia fabriko. La familio de „F”-kondiĉoj (FCA, FAS, FOB) postulas de la vendanto, ke li liveru la varojn

al transportisto elektita de la aĉetanto. La familio de la „C”-kondiĉoj (CFR, CIF, CPT, CIP) precizigas, ke la vendanto devas zorgi pri la transporto dum la ĉefa vojaĝo, sed ne zorgas pri la asekuro de la varoj, nek pri la transporto post enŝipigo de la varoj en la ĉefan transportilon. Fine, la „D”-kondiĉoj (DAF, DES, DEQ, DDU, DDP) postulas de la vendanto, ke li pagu ĉiujn kostojn kaj portu ĉiujn riskojn pri perdiĝo de aŭ damaĝo al la varoj ĝis la lando de la aĉetanto.

En la revizio 2000 ne estas grandegaj ŝanĝoj. La lasta revizio, aperinta en 1990, kreis pli da novaĵoj.

La unua ĉefa ŝanĝo estas klarigo de la kondiĉo FCA: tiu, kiu ŝarĝas aŭ malŝarĝas la varojn, estas tiu, kiu posedas la taŭgan materialon kaj dungitaron por tio en la ejo antaŭvidita.

La dua rilatas al la dokumentoj. Tiu, kiu devas zorgi pri la administraj kaj doganaj formalajoj, estas tiu, kiu povas trakti tion plej facile: vendanto en sia lando, importisto en la sia (krom por EXW kaj DDP).

La tria grava ŝanĝo koncernas FOB, nun nur mara kondiĉo, kun transdono de la respondeco „trans la pavezon de la ŝipo”. Jam FOB celis tiujn kondiĉojn antaŭe, sed multaj kontraktoj menciis malseriozajn tipojn de FOB (FOB fabriko, FOB iu enlanda punkto ktp.) Nun precizigoj estas sufi-

ĉaj por eviti tion, espereble! Sed, malgraŭ la fameco kaj malnoveco de la principo de Inkotermoj, kelkaj eksportistoj aŭ transportistoj daŭre eraras kaj ne sekvas fidele la kondiĉojn menciitajn. Tiam povas okazi miskomprenoj, malfruoj kaj malkontento de la klientoj.

Tial kelkaj profesiuloj de internacia komercio konsilas preferi kelkajn kondiĉojn al aliaj, kutime malpli bone uz-

## Tuj apud Zamenhof

Iam mi fondis kaj redaktadis specialistan periodaĵon, *Biblia Revuo*, kiu dum dek-iom da jaroj sukcesis vivi, en du periodoj. Iom post la komenco de ĝia dua periodo, Gaston Waringhien [gastón varengjén] leteris al mi, kaj tiel komenciĝis sporada korespondado inter ni, daŭrinta ĝis lia morto. En 1971 (se mia memoro ne eraras), li petis, ke mi permesu, ke li kandidatigu min por la Akademio de Esperanto. Mi jesis, kaj elektiĝis. Tuj post mia elektiĝo, li sendis al mi kolekton de ĉiuj cirkuleroj kaj diskutofolioj de la Akademio dum lia ĝistiama prezidanteco. Tiel mi povis ne nur legi la detalojn de la diskutoj en la Akademio, inkluzive de tiuj pri la -ata/-ita afero, sed ankaŭ ekkoni lian manieron prezidi tiun gravan instancon.


Per tiu, eble neprofundega tamen multimpresa, konatiĝo kun Waringhien, lia pensado kaj lia prilingva laborado, mi komencis kompreni, kiom Esperanto ŝuldas al li. Nu, ni ne samopiniis pri ĉiuj temoj – tamen li ĉiam montris sin diskutopreta, kaj (eble surprize al tiuj, kiuj ne persone konis lin) tre tolerema. Ne nur pri lingvaĵoj. Mia provo nove traduki la *Psalmojn* el la antikva hebrea multe interesis lin, kaj li faris plurajn sugestojn kaj proponojn literaturecajn, kiujn mi trovis tre utiligindaj. Eble ĉar kaj li kaj mi estis/ estas ateistaj, kvankam ne rabiaj, ni ambaŭ povis senantaŭjuĝe pritaksi la diversajn tradukoproblemojn, kiujn amase prezentas la *Psalmoj*.

Ĉiam mi multe scivolis pri tio, kian historion havis Waringhien, kaj kia li estas kiel persono. Nun André Cherpillod [andré ŝerpiljód] kontribuas biografieton, kiu helpas koni la historion de Waringhien, kaj – tre heroadore – kia persono li estis. Cherpillod montriĝas Waringhien-adoranto. Por li Waringhien estas heroo, kiu, se juĝi laŭ la enhavo de la biografio, neniam faris mispaŝon aŭ eraron. Nu, mi ne rajtas kulpigi Cherpillod-on rilate al lia eble troa adorado al lia heroo. Kiu ne tenas en sia menso fantaziojn pri iuj idealigitaj personoj? Cherpillod rangigas Waringhien-on tuj apud Zamenhof, kelkfoje ni suspektas, ke laŭ li Waringhien rangas pli alte ol Zamenhof. Nu, se Zamenhof fariĝis kultidolo por multaj esperantistoj, kial ne ankaŭ Waringhien? Ĉiu laŭ sia gusto ...

Resume: Cherpillod verkis tre utilan biografieton dulingvan (franca teksto sur la dekstraj paĝoj, esperanta teksto sur la maldekstraj), kaj mi dankas pro tio. Li klare kaj bele memorigis al ni tre konindan kaj respektindan personon.

Donald BROADRIBB

André Cherpillod: *Gaston Waringhien 1901-1991, heroldo de la internacia lingvo/Gaston Waringhien 1901-1991, héraut de la langue internationale*. Eld. Memeldono/autoédition, Courgenard (Francio), 2000. 80 paĝoj glue broŝuritaj. ISBN 2-906134-49-X. Prezo ĉe FEL: 8,50 eŭroj + afranko.



Gaston Waringhien



itaj. Ekzemple, oni preferu FCA fabriko al EXW, FCA flughaveno al CPT/CIP aŭ DDU, FCA depono de la ŝipkompanio al FOB aŭ CFR, DES al CIF. Tio ne signifas, ke tiuj Inkotermoj maltaŭgas, sed ke multaj misuzas ilin kaj tio povas kaŭzi problemojn dum la vojaĝo aŭ kun la kliento, se okazis miskompreno. La aliaj kondiĉoj proponitaj estas pli simplaj kaj malfacile konfuzebaj. Dum la prilaboro de tiu ĉi revizio 2000, partoprenis unuafoje usonanoj kaj azianoj. Kampanjo por diskonigi Inkotermojn okazas nuntempe en Usono kaj ni povas esperi ke tiu ĉi versio estos vere uzata tutmonde.

Internacia, seppersona laborgrupo de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) en la printempo de 2000 tradukis la anglan/francan originalon esperanten. La mallongigoj de la kondiĉoj (FOB, CIF...) restis, ĉar temas pri internacie akceptitaj esprimoj. Kiel en la originalo, estas por ĉiu kondiĉo mallonga (proksimume duonpaĝa) difino. Apud tiu difino aperas ankaŭ la anglalingva difino. Tiel eblas kompari ambaŭ versiojn (kaj eble iom plibonigis lingvoscion). Post la difino sekvas dudek eroj (similstrukturaj por ĉiuj kondiĉoj), en kiuj la devoj de la vendanto kaj de la aĉetanto estas detale klarigitaj.

Bruno FLOCHON

*Inkotermoj 2000.* El la angla tradukis IKEF. Eld. IKEF, Bruĝo, 2000. FEL estas la ĉefa distribuanto. 128 vinktitaj paĝoj. ISBN 92-842-1199-9. Prezo ĉe FEL: 19 eŭroj + afranko.

## Vitraj ŝuoj de gramatiko



La unua eldono de ĉi tiu studlibro estis eldonita en 1958 de Kroata Esperanto-Ligo. Ĝi celas esti facile konsultebla, sufiĉe detala priskribo de la gramatiko de Esperanto, bazita sur *Plena*


*analiza gramatiko de Esperanto* de Kalocsay kaj Waringhien. Kvankam kelkfoje ĝi varias de la preskriboj de PAG (ĉiam kun atentigo pri tio), ĝi plejparte restas fidela al sia inspirverko. Konsekvence, la enhavo estas la konvencia, tradicia latin-greke bazita pri-

## Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko  
<http://retbutiko.esperanto.be>

① **Anna Löwenstein**  
dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

Anna Löwenstein



② **Lena Karpunina**  
La bato Prezo: 12,00 EUR

③ **Maria Becker-Meisberger**  
dua eldono Internacie kuiru Prezo: 10,00 EUR

④ **Ernest Claes**  
Kobo Prezo: 24,00 EUR

⑤ **Johan Hammond Rosbach**  
Nomoj Prezo: 8,00 EUR

⑥ **Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck**  
Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR

⑦ **Markus Sikosek**  
Esperanto sen mitoj Prezo: 22,50 EUR

⑧ **Gonçalo Neves**  
Simptomoj Prezo: 8,00 EUR

⑨ **Paul Gubbins**  
Subtekste Prezo: 12,00 EUR

⑩ **Felix Timmermans**  
nova Cecilija Prezo: 12,00 EUR

Ĉiuj tiuj libroj - krom "Esperanto sen mitoj", kiu reaperos jarfine - estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

Fakse: + 32 3 233 54 33

skribo (oni parolas, ekzemple, pri gerundioj, distingas inter diversaj specoj de prefiksoj, sufiksoj, prepozicioj, kc.), kaj – miaopinie – la verkintoj konfuzas semantikon (signifo de vortoj), morfologion (konstruformo de vortoj), kaj kategoriojn de verboj, ne ĉiam atentante, ke tiuj tri fakoj de lingvoanalizo povas kontraŭi unu la alian (eĉ en Esperanto!).

La rezulto – ankoraŭ miaopinie – estas iom simila al la epicikla teorio pri la strukturo de la universo: teorio konstante fariĝanta pli kompleksa, kun pli kaj pli da specialaj esceptoj kaj novaj

subreguloj, ĝis ĝi preskaŭ superfortas la menson.

Zamenhof ja bazis Esperanton sur la tradiciaj lingvoj jam konataj de li.

Sed estas malpli evidente, ke li senkonscie plene antaŭsupozis la vastan analizoskemon de orienteŭropaj lingvoinstruistoj. Ke li konstruis Esperanton sole laŭ la baza skemo de la hindeŭropaj lingvoj, estas tre dubinde, ĉar li ja estis eksperto pri la hebrea lingvo. Al mi multo en Esperanto memorigas gramatikelementojn semidajn multe pli ol hindeŭropajn, kaj tio necesigas, ke ni liberiĝu el la vitraj ŝuoj en kiujn

# Nova romano en la serio de FEL



Paĝoj: 106; ilustrita;  
21 cm; kudre bindita;

Prezo: 12,00 €

Jen tri perletoj de la flandra literaturo. *Ceciljan mi vidis veni* estas proza poemo, idilio kun tragika fino, melankolia romano. En *La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforoza*, begineto la juna begineto Simforoza enamiĝas al la ĝardenisto Marteno, kiu poste eniras la monaĥejon. *Tre bela*, simpla kaj pura historio. *Kristnaska Triptiko* estas vera juvelo pro sia naiva, pia priskribo.

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: [butikofel@esperanto.be](mailto:butikofel@esperanto.be)

<http://retbutikofel.esperanto.be>



Furoro de 

niaj tradiciaj gramatikistoj penis kaj plu penas enŝovi nian cindrulinan Esperanton. Sed tian liberigon oni ne trovas en ĉi tiu *Kompendio*.

Eĉ forpuŝante tiujn konsiderojn, ni rajtas demandi, ĉu la detalega analizado de specoj de substantivoj, specoj de pronomoj, specoj de adjektivoj (kvalitaj, cirkonstancaj, kvantaj, determinaj, artikola, numeralaj), simplaj tempoj, kunmetitaj tempoj, kc., kc. vere estas studenda de niaj superaj-ekzamenoj-kandidatoj. Ni pripensu: ĉu povas esti, ke tiu tro rigora katalogado blindigas ilin al la kerna karaktero de Esperanto? Mi elkore kredas, ke sub la nomo de gramatikinstruado niaj gramatikinstruistoj senintence detruas la esencon de Esperanto. Kian grandegan multmilionbrikan gramatikan strukturon ili faris el la dekkvar bazaj brikoj de Esperanto: -a, -e, -i, -o, -u, -j, -n, -as, -is, -os, -us, -a(n)t-, -i(n)t-, -o(n)t-, kaj kelkmil radikoj!

Formetinte tiun konsideradon, mi tamen diru, ke la *Kompendio* ja estas facile konsultebla, plejparte klare prezentita, kaj plejparte fidinda prezento de sia enhavo. Kelkaj tajperaroj povas konfuzi la studenton, kio bedaŭrinde. Malpli plaĉas al mi la fonologia parto. Iom duba estas la instruo ke:

„En Esperanto validas la regulo, ke ĉiam la antaŭa konsonanto konformiĝas al la posta. Do, la vorto ABSOLUTE estas elparolata kiel APSOLUTE, OKDEK kiel OGDEK, EKZISTI kiel EGZISTI, ktp. ... Oni neniam forgesu, ke la ĉefa regulo de la prononcado estas la natureco kaj ne la absoluta korekteco.” Ankaŭ la reguloj donitaj pri longeco kaj mallongeco de vokaloj ĝenas min.


Aliflanke, la aŭtoroj (Manner-Mamuĵiĉ kaj Ivo Boroveĉki, la redaktoro de la „2a ŝanĝita eldono”) tre laŭinde inkluzivas detalan liston de landnomoj, laŭ la listo eldonita antaŭ pli ol jardeko de la Akademio de Esperanto; kaj mencias senpartie la -ata/-ita-batalon, kvankam sen klara eksplico de la oficiala decido de la Akademio pri tio.

Por amantoj de la PAG-speca gramatikanalizado, la *Kompendio de la Esperanta gramatiko (por superaj ekzamenoj)* estas utila kaj havinda konsultlibro.

Donald BROADRIBB

Mirko Nabber Manner-Mamuĵiĉ: *Kompendio de la Esperanta gramatiko (por superaj ekzamenoj)*. 2a ŝanĝita eldono. Eld. Esperanto-societo Bude Borjan, Zagreb, 2000. 109 paĝoj, broŝurita. ISBN 953-98127-0-4. Prezo ĉe FEL: 8,00 eŭroj + afranko.

# Kripte kruce



## Horizontale

2. Sindevigo kaŭzita de diservo.
9. Ekstrema palindroma.
10. Tiajn metodojn ni uzas en niaj ĉe-estaj kursoj.
12. Tia estas olimpi-urba insisto ne uzi seĝon.
14. Mallonga kaj malgranda eksterterulo.
15. Pigmea ĉefo kunvivas kun komputile ligitaj turdo, testudo kaj tigro;
17. Pantalono-tenilo por tradicia poeto.
18. Du partoj en la brita ĉefurbo identas.
19. Pro penso, ke ili trenos fuŝe aferojn, li estis forlasanta la domon.
22. Kanti malaltvoĉe, eĉ dum mise konceptita prezentaĵo kroma.
23. Diskutaj: la kaŭzativo.
25. Fea monstro krevigas sin en klopodo akiri aeron.
28. Ite, sed nebene, en precizigita loko.
29. Tro tikla la genetika inĝenierado necesa por kreo de ĉi tiu ĝarden-ornama herbo - do uzu nur la radikon.
31. Katastrofoj pere de plenpotencaj paroj.
33. Koko manĝita, ĝia kresto iĝas rubo, kaj kontribuos al ĝardena fekundigilo.
34. Kiam tiu futuraĵo eniras platan kuirilon, la rezulto estas drameca tristeco.

## Vertikale


1. Venĝema birdejo - al tio ne estas klopodata.
2. Iom negative oni taksas provon mezuri la pezon de io, kion oni fuŝlokas.

3. Honorigo pro interna neteco.
4. Ne restu sen mon': reordiĝu kaj uzu vian pensilon.
5. Malgranda komenc'.
6. Ĉe infana ĝangala kato ne volanta iri, vidiĝas esprimo de amuziĝo pro la komenciga ago.
7. Troveblas apud la kapo de aŭstralia kares-besto, akva transportilo kaj rostita pano.
8. Konfuzo nomitan - ĉar la signifo estas radike la malo.
11. Transportilo por perturbita grupo de junaj esperantistoj.
13. Varma eŭropa aŭ malvarma azia regiono? Tio dependas ĉu ĉeestas aŭ mankas la kapo de sanktulo. Hodiaŭ mankas, do varma.
16. Tirila renverso: al tio devas ligiĝi.
20. Elite? Eble, sed ne tiumaniere.
21. Havis la varojn, sed devis reordigi ilin por scii kiom kostis.
24. Vulkana ekspodo en Italio ŝajnas esti reala ekzistaĵo, tamen ĝi estas nur abstrakta.
26. Rearanĝa task': ĉiuj aĵoj estu unu sur la alia.
27. La gafo sur tiu velboato verŝajne estis dishakita de la arbo-specio kiun ni serĉas.
30. Parto de poezia rivero sonas same, eĉ kiam ĝia duono malaperis.
32. Tiu leon-bleko sonas same feroce eĉ kiam duone farita.

Stefan MacGill, Hungario

Sendu la tutan solvon antaŭ la 16a de majo al nia redakcio: MONATO (Enigmoj) Frankrijklei 140 BE-2000 Belgio aŭ rete [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be).

**Ne forgesu indiki vian preferatan premion.**



- 1) **La nuda feino** (Leopold Vermeiren)  
Ĉarmaj erotikaj rakontoj.
- 2) **Murdo en Esperantujo** (Daniel Moirand)  
Tensi-plena krimromano, n-ro 5 en la serio „Stafeto”.
- 3) **Gramatika ABC-mempraktikilo** (Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme)  
Ekzercaro por profundigi viajn gramatikajn lingvokapablojn.

## Solvo oktobra 2000

Ne sen konto, sennokto, neskoton, tokson ...ne, aŭ kontesto sed **KONSENTO** estas la ĝusta solvo, kion plej multaj de niaj legantoj prave sendis. Tri feliĉas pri premio nome: **H. Green, Aŭstralio; A. Masiukas, Rusio kaj R. Foucher, Francio.** Kore gratulas la redaktoro de enigmoj.



# Monato

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

**Eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be) TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

**Ĉefredaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net)

**Redakcia sekretario:** P. Peeraerts.

**Reviziantoj:** Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidéliusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

**Korektanto:** Izabel C. Oliveira Santiago.

**Grafiko:** Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



## MONATO - redaktoroj

**Arto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando. Reta adreso: [desperanto@mtu-net.ru](mailto:desperanto@mtu-net.ru)

**Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio. Reta adreso: [rotsaert@esperanto.be](mailto:rotsaert@esperanto.be) (nur askiaj dosieroj!) Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

**El mia vidpunkto:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net)

**Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio. Reta adreso: [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

**Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

**Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

**Komputado:** Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL. Reta adreso: [edmund@rano.org](mailto:edmund@rano.org)

**Leteroj:** Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reta adreso: [guido@fel.esperanto.be](mailto:guido@fel.esperanto.be)

**Libroj:** Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono. Reta adreso: [kolker@stratos.net](mailto:kolker@stratos.net) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

**Nota:** Librecozojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

**Lingvo:** YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reta adreso: [syama@dokkyo.ac.jp](mailto:syama@dokkyo.ac.jp) Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

**Medio:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo. Reta adreso: [mattos@super.com.br](mailto:mattos@super.com.br)

**Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Scienco:** Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando. Reta adreso: [gerrit.en.madzy@planet.nl](mailto:gerrit.en.madzy@planet.nl)

**Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

**Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

## Plene neutila

**Kio estas la diferenco inter matematikista pensmaniero kaj fizikista? Du ekzemploj:**

### La akvovarmigado

Jen problemo A: ni havas alkoholan primuson, fajrilon, tripiedon kun ujo je konvena alteco por la primuso kaj karafon da akvo. La tasko estas, laŭ fizikista maniero varmigi la akvon.

La *fizikisto* enverŝas la akvon en la ujon de l' tripiedo, bruligas la primuson per la fajrilo kaj ŝovas la primuson sub la ujon kun akvo – kaj la ceter' ... estas nur iom atendi ...

Problemo B: la sama situacio kiel supre, kun la nura diferenco, ke nun la akvo jam troviĝas en la ujo de l' tripiedo.

*Matematikista* solvo estus: elverŝi la akvon el la ujo en la karafon; konstati ke jen nun ni estas jam ĉe la origina situacio de problemo A; tiu jam estas solvita, do: ni pretas!

Tute logika, tute ekzakta, plene neutila.

### La balono


Biciklisto veturas tra vastega ebena poldera lando. Nenie iu fiksa punkto por orientiĝi, krom ie-tie bovino aŭ areto da arboj.

Subite aperas super li balono, en kies korbo troviĝas balon-vojaĝanto. Tiu iom malleviĝas, kaj krias al la biciklisto: Mi perdis la vojon. Kie mi estas?

Respondo: Pli-malpli 15 metrojn super la herbejo, en korbo sub giganta balono.

Reago malespera: Ho kial mi trafis ĝuste nun *matematikiston*?

Respondo tute logika, tute ekzakta, plene neutila ... Gerrit BERVELING



## Ĉapelmaniulino Maria (ĉapelema rakonto)

Ĉapelmaniulino Maria tre ŝatis ĉefajn ĉapelojn kaj la ĉinan ŝaŭmmanĝaĵon ŜAŬMAĴO. Sed post kiam la marko ŜAŬMAĴO estis vendita al ĉeĥa firmao kaj ĉefiĝis, ankaŭ ŝi ĉefiĝis jaŭde, kaj en Ĉeĥio ŝi ĉiutage iris al ĉapelejoj por aĉeti ĉapelojn kaj al ĉeĥa ŝaŭmmanĝaĵejo por manĝi ŜAŬMAĴON.

Al la ŝaŭmmanĝaĵejo ankaŭ ĉinoj ofte venis per ĉeĥa ŝarĝaŭt-ŝipo pro ŝatata ŜAŬMAĴO kaj ankaŭ pro tio ke tie aŭdiĝis ĉeĥaj ŝercaĵoj kaj ĉeĥaj ĵazoj. Kaj ili ĉiutage atendadis ŝin, kaj kiam ŝi aperis, la ĉinoj ĝoje eĥis / ĵus! / ŝaŭme. Kaj senĝene, ili ĉiuj laŭdis la enhavon de ŝia korsaĵo.

Ĉar ŝi pli kaj pli ofte iris al la ŝaŭmmanĝaĵejo pro ŜAŬMAĴO kaj ankaŭ pro la ĉinoj, ŝia vizaĝo dikiĝis, kaj ŝiaj ĉeĥaj ĉapeloj jam ne bone sidis al ŝi. Do ŝi iris al naĝbaseno por maldikiĝi, kaj ŝi naĝadis en ĉiu jaŭdo. (Ĝuste jaŭde, ĉar en kinejo apud la naĝejo estis ĉiujaŭde ŜOĤTIĜO, ŝia ŝatata kino.) Dum la naĝado pro fortostreĉo ŝi senĉese ŝrikadis tiom, ke ŝia voĉo eĥiĝis jaŭde, sed estis eĥoŝanĝo ĉiujaŭde.

## Kaskedmaniulo Mario (nudkapa rakonto)

Kaskedmaniulo Mario tre amis usonajn kaskedojn kaj la japanan hamburgeron HAMBURGO. Sed post kiam la marko HAMBURGO estis vendita al usona firmao kaj akiris usonecon, li mem akiris usonanecon en la kvina tago de semajno, kaj en Usono li en neniuj tago forgesis iri al kaskedovendejoj por enmanigi kaskedojn, kaj iri al usona hamburgerejo por gustumi HAMBURGON.

Al la hamburgerejo, krom li, japaninoj ofte venis per flava taksio pro amata HAMBURGO, kaj krome pro tio

ke tie oni okulume flustris al ili kaj estis ludataj usonaj rokenroj. Kaj ili en neniuj tago forgesis atendi lin, kaj kiam li aperis, la japaninoj gaje kriis /jen !/ balaante panpecojn. Kaj sen-

hezite, ili unuanime aprezis la enhavon de lia kaskedo.

Pro tio ke li pli kaj pli ofte iris al la hamburgerejo pro HAMBURGO kaj pro la japaninoj, liaj vangoj estis jam pufaj, kaj liaj kaskedoj jam ne bone sidis al li.

Do li iris al gimnastikejo por forpreni sian grason, kaj li neniam forgesis gimnastiki en la kvina tago de la semajno. (Nur en la kvina tago pro tio ke en kinejo apud la gimnastikejo estadis en la kvina tago KRUCUMIGO, lia amata kino.)

Dum la gimnastikado pro strebado li kriadis tiom, ke lia voko trairis dum la gimnastikado, sed la voko estis jen tenora, jen basa, jen kontralta.



IKAI Yosikazu

# — anoncetoj —

**(Re)Abonu FONTO-n!** La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega *fonto* de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

**Naturista Vivo**, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4\*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fő u. 41/5 HU-8531, rete: [nalt@konyvtar.c3.hu](mailto:nalt@konyvtar.c3.hu).

**Internaciisto**: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provkempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

**ESPERANTO**



# Eventoj

aperas dusemajne

pk. 87, Budapest,  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj fakso:  
+36-1-2828885  
[eventoj@hungary.net](mailto:eventoj@hungary.net)

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

## EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.

Petu provkempleron de:

Eventoj

Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario

Rete: [eventoj@esperanto.org](mailto:eventoj@esperanto.org)

## Fakprelegoj en popularsciencia stilo

La 49a printempa staĝo de **Orient-Franca Esperanto-Asocio**. Okazos la 20an, 21an kaj 22an de aprilo 2001 en montara vilaĝo Storckensohn je 40km de urbo Mulhouse en orienta parto de Francio. Ĝin organizas la loka grupo **Mulhouse-Esperanto** kun la kutimaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj praktikantoj. Aldone al tio okazos seminario, kiu ricevas specialan pritakton. Du fak-asocioj **TAKE** kaj **IKEF** prizorgos serion da prelegoj fare de fakuloj pri plej diversaj temoj **sed en popularsciencia stilo** por klera publiko. Jen kelkaj el la planitaj prelegoj:

- Kemio por nutraĵoj
- Pri konstruado
- Polderoj en Nederlando
- "EVG" Konstruado kaj ĝia elektra muntaĵo-sistemo
- Konstru-fiziko
- Esperanto kaj ties literoj en komputilo kaj en la reto
- E-komerco (komerco per la reto)
- Memortekniko
- Spertoj el staĝo en ĉina komerca firmao
- Asimilado de trejnkurso
- Aliaj prelegoj aldoniĝos



**IKEF**  
INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA GRUPO




Pliaj informoj estas haveblaj ĉe

S-ro Robert KUENY, 30, rue des champs

FR-68690 GEISHOUSE, Francio

Tel. 33(0)3.89.82.37.62

Rete: [mulhouse.esperanto@mageos.com](mailto:mulhouse.esperanto@mageos.com)



Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140

2000 Antwerpen

valoro \_\_\_\_\_

Donaca  
karto

subskribo \_\_\_\_\_

**Utila Donaco!**

- Difinu mem la valoron de via donaco.

- La kupono estas interŝanĝebla kontraŭ libroj, diskoj aŭ Monato-abono.

- Mendu la kuponojn ĉe butikoj de Flandra Esperanto-Ligo,

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Tel: +32 3 234 34 00 Fakso: +32 3 233 54 33

Retpoŝto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

# IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

## Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

## Kiel funkcias?

Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

## Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi ricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

## Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo  
Frankrijklei 140  
2000 Antwerpen  
tlf. +32 3 234 34 00  
tlk. +32 3 233 54 33  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>

Stafeto  
librorondo

